

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԵՅԵԼԻ
ՅԵՐԱՅԵՆԻՔՈՒՅԵՐՍՅԱ

Ĉi-numere legu pri:
PLI OL 10.000 VIZITOJ DE NIA PORTALO
TIBOR SEKELJ - DU JARDEKOJN POST LA MORTO
VOJAĜIMPRESOJ EL BULGARIO
FOLKLORA FESTIVALO "AŬTUNOJ DE VINKOVCI"
IMPRESOJ DE ALBANO PRI KROATIO
INTERVJUO: IVO PUHARIĆ
IVANA BRLIĆ MAŽURANIĆ
EL "LA ODORA ĜARDENO DE
ŠEJKO NEFZAVI"

5

2008

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakciaĵoj:

Marica Brletić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro,
marto, majo, julio, septembro
kaj novembro). En 2008 aperos
ses numeroj.

Jarabono por 2009:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj
al ĝirkonto de UZE
2340009-1110321529
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: uzes-y

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

RESUMO

Ekde sia renovigo meze de septembro, la portalo de "Zagreba Esperantisto" akiras ĉiam pli da viaj simpatioj - dum iom pli ol unu monati ĝi registris pli ol 10.000 vizitoj! Sed, samtempe venis la tempo pensi pri renovigo de abono al la presita eldono. Ĉi-kune ni sendas al vi pagilojn, per kiuj vi povas aboni nian revuon por 2009, au subteni nian "Abonhelpan fonduson" aŭ fariĝi sponsoroj por konstruigo de Dokumenta Esperanto-Centro, pri kiu ni skribis pasintnumere.

Multe da spaco ni dediĉis omaĝe al Tibor Sekelj, kies forpason antaŭ dudek jaroj ni rememoras per teksto kaj fotoj. Krom tabor, ni eltiras el forgeso ankaŭ informon pri kroata-novzelanda esperantisto Šimun Mijo Ujdur, kaj pri la vivantoj jen rakontoj pri Ivo Puharić el Makarska kaj Esperanta artistino Anneke Buys el Nederlando.

Inter interesej movadaj aranĝoj ni informas pri Brazila Esperanto-kongreso, provsesio de AIS en Banja Luka, MIRO en Slovenio kaj Pupteatra Internacia-Festivalo, kiu ĉi-jare ricevis sian monografion. Vojaĝimpresa artikolo gvidas nin ankaŭ al Bulgario dum la ĉi-jara SAT-kongreso.

El interesajoj el kroatia historio ni mencias la heroaĵon de la defendantoj de Gvozdansko, memortumulon pri miljariĝo de kroatia regno en la zagreba park-arbaro Maksimir, kaj aparte interesa estas mencio pri la unua diĝitigita gazeto en Kroatio. Per foto-raporto ni konigas al vi la faman festivalon "Aŭtunoj de Vinkovci", kaj siajn impresojn pri nia lando artikole prezentis nia albana samideano. El fora Siberio, la riveron Jenisejo kaj la urbon Krasnojarsko per fotoj prezentas nia rusa legantino.

Aparte grava por nia redakcio estas la statueto de "Spegulo", per kiu estis premiita nia chfredaktoro, interalie ankaŭ pro la redakta laboro en nia gazeto. La publika proklamo okazis en la fama pola kultura aranĝo "Arkones".

Ni reklamis Esperanton en la bieno "Zrno" de Zlata Nanić, kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj preparas sin por jarkunveno.

Por tiuj, kiuj jam pretiĝas por nova vojaĝsezono, gravas meti en sian vojaĝkalendaron ankaŭ la ILEI-konferencon okazontan en Krakovo, senpere antaŭ la UK en Bjalistoko.

Plenaj da entuziasmo venu al pluraj aranĝoj okazontaj en Zagrebo jarfine. Raportu por nia presa eldono kaj por nia portalo. Ju pli da viaj reagoj, des pli ni sentas nian kontenton pro la investita laboro.

La redakcio

PLI OL 10.000 VIZITOJ DE NIA PORTALO




Ekde kiam la estraro de UZE komencis pensi pri sia propra retejo, ĉiam ekzistis multe pli grandaj deziroj ol realigeblis per disponeblaj fortoj kaj rimedoj. Tamen, la reliago de revoj okazis komence de septembro, kiam la malnovan retejon de "Zagreba Esperantisto" anstataŭis multe pli kompleksa kaj riĉa, ofte aktualigata portalo.

La kvalita salto okazis pro la unuigo de


fortoj de kelkaj aktivuloj de UZE, ĉiu en sia branĉo, kun la celo, ke kroatiaj esperantistoj finfine ricevu tutmonde konsulteblan portalon, ĉiam kun freŝaj kaj interesaj novaĵoj.

Ke la laboro ne estis vana, montras pli ol vizitoj vizitoj en iom pli ol unu monato. Se vi volas ekscii pro kio tioma intereso, kontrolu ĉe www.zagreba-esperantisto.hr

NOMBRO DE VIZITOJ DE LA PORTALO "ZAGREBA ESPERANTISTO"



PELITA PER SANGO DE VOJAĜANTO

 Josip Pleadin

LA SANGO MIN PELAS

*Ne atendu de mi verkojn tre ravajn
eta la papero sur kiu mi skribas
ne atendu de mi fajrojn tre gravajn
mallonga la vivo tra kiu mi drivas
ne atendu de mi heroaĵojn bravajn
ĉar mia koro feble batas en la brust'*

*Kaj cetere eĉ se mi povus
kio restis por mi farenda?*

*la dia komedio estas finverkita
la gordian nodon solvis homo sprita
venkita estas la drako mita*


nenio restis por mi farenda

*tamen mi devas verki
eĉ se per ungoj mi ĉizas en sablo
senkoherajn vortojn
batali mi devas
eĉ se en rulseĝo sur batalkampo
mi lasas la lastajn fortojn*

*Ne gravas ĉu spuroj postrestas
agi mi devas:
la sango min pelas, eĉ se fortoj forestas*

Subotica, 11. 6. 1988.

Kiam en la roterdama Universala Kongreso de Esperanto en 1988 mi renkontis **Tibor Sekelj**, mi rimarkis, ke li aspektas malsanece, sed tiumomente mi eĉ ne pensis, ke ni renkontiĝis lastfoje. Mi eĉ ne imagis, ke lia poemo "La sango min pelas" verkita iom pli ol unu monaton antaŭ tiu renkontiĝo kaj sendita al mi, samtempe estos lia lasta saluto. Tiujare kun la kolegoj en nia loka klubo ni volis ekeldoni novan literaturan revuon sub la titolo "Koko", kaj Tibor reagis inter la unuaj, reprezentante la tiaman Esperantlingvan Verkistan Asocion, kiun li gvidis ekde 1983. Li skribis: "EVA salutas iniciaton eldoni novan literaturan kaj kulturalan revuon sub la nomo KOKO en Đurđevac,




Maldekstre: la poemo "La sango min pelas" represita el "Koko" n-ro 1/1988, la plej konata portreto de Tibor Sekelj kaj la aŭtoportreta desegnaĵo kiun Tibor faris en 1985 (kompleze sendita al la redakcio de Zdenka Rojc el Maribor, Slovenio).

Jugoslavio. Jen invito al nia centmembra komunumo al plua aktivado sur la beletra kampo, kaj per siaj verkoj kaj verketoj kontribui al la disflorado de tiu ĉi nova eldonajo. Iuj certe pensos: kial eldoni novan literaturan revuon, se jam ekzistas du kiuj bone funkcias? La respondo estas facila: ĉar du relative malgrandaj kaj malofte aperantaj ne sufiĉas por la krea aktivado de cento da EVA-noj, al kiuj aldoniĝas pluaj 50 verkistoj nemembroj de la Asocio, kaj almenaŭ cento da aliaj esperantistoj kiuj havas ion interesan por diri, ĉu en prozo ĉu en

verso." Tiu teksteto aperis en la unua numero de tiu revueto, kiu, bedaŭrinde, titolpaĝe publikigas lian foton kaj la jarojn 1912-1988. Ankaŭ la poemo aperis en tiu kajereto. Tibor forlasis nin la 20-an de septembro 1988.

Pasis plenaj 20 jaroj post lia foriro, kaj lia verko ankoraŭ forte vivas kaj inspiras nin.

Li naskiĝis en Spiška Sobota (en Tatroj, Slovakio) la 14-an de februaro 1912, tiam konsistiga parto de Hungario. Lia infanaĝo pasis en la limaj regionoj de Aŭstri-hungara monarkio, en la hungare parolanta familio. Tre frue post lia naskiĝo, la familio migris al la banata vilaĝo Ĉenej, kie li komencis frekventi hungarlingvan lernejon. Tie li lernis ankaŭ la lokan germanan dialekton. La edukadon li daŭrigis en Kikinda (Vojvodino) en la



tiana serbokroata lingvo, kaj poste en la gimnazio de Nikšić en Montenegro. En la jaro 1929, laŭ la deziro de sia patro, kiu volis pere de sia filo realigi siajn nerealigitajn ambiciojn, Tibor fariĝis studento de juro en Zagrebo, kiun li finis kiel 21-jarulo en tre

mallonga periodo. Ĉar la studado de juro ne estis lia elekto, la zagrebajn studentajn jarojn li eluzis por lerni Esperanton, kiu en lia posta vagado tra la mondo, fariĝos lia ĉama ŝatokupo. Kaj nuntempe ni aldonus, ke temis pri io pli granda ol ŝatokupo. En Zagrebo li malkovris ankaŭ sian emon al pentro- kaj skulptarto, kaj tre frue li komencis ankaŭ literatureverki. Mallonge li laboris en Zagrebo kiel dramverkisto kaj ĵurnalisto, sed pro la interna voko de vojaĝanto, li multe vojaĝis, unue tra sia lando, kiun li portretis per desegnaĵoj, akvareloj kaj vojaĝprikskribaj notoj. Per bonŝanca ludo la ĵurnalista profesio venigis lin al lia vera vivoĵo. Kiel ĵurnalisto, post dek zagrebaj jaroj, li ricevis komision vojaĝi al Argentino, por verki raporton

daŭrigo ➔ paĝo 138

OMAĜE AL Kristina Kujundžić TIBOR SEKELJ

En Subotica (Serbio), kie dum longa tempo vivis, laboris kaj aktivis eminenta esperantisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj, la 20-an de septembro 2008 kunvenis geesperantistoj el Subotica, Senta kaj Novi Sad por omaĝi lian forpason antaŭ 20 jaroj. Dum tiu ĉi renkontiĝo ni rememoris lian vivovoĵon plene dediĉitan al Esperanto. Poste ni kune vizitis lian tombon kaj metis florojn sur ĝin. La vidvino de Tibor, Erzsébet Sekelj, per kortuŝaj vortoj emfazis siajn sentojn al la forpasinto.



➔ daŭrigo el la paĝo 137

pri jugoslavijaj elmigrintoj en Suda Ameriko. En la sudamerika kontinento li trovis sin ĝuste en la komenco de la dua mondmilito, kaj tio konsiderinde plilongigis lian vivadon tie. Li ellernis la hispanan, kaj baldaŭ fariĝis ĵurnalisto en Buenos Aires. Sian verkistan laboron, ekde la komenco grandparte orientitan al infana publiko, li realigis en la hispana kaj portugala per libroj de jugoslavijaj popolarakontoj (1944-1945, respektive 1947). En 1945 li publikigis ankaŭ sian unuan libron en Esperanto: "La trovita felico".

Du jarojn antaŭ tio, li konatiĝis kun Johann Georg Link, svisa alpinisto, granda esploranto de Andoj, kaj tiu konatiĝo poreterne ŝanĝis la vivon de Tibor. Kiel membro de la naŭopa ekspedicio, kun Link li grimpis al Akonkagvo (7035 m). La tragedio kiu trafis la ekspedicion kaj mortigis kvar el ĝiaj plej elstaraj membroj, tamen indulgis Tibor kaj la aliajn. Tiun sperton Tibor eternigis en la libro "Tempesto super Akonkagvo" (en la hispana aperinta en 1944 kaj en Esperanto en 1959). La dua hispana eldono en 1945 estis kompletigita per ĉapitro pri lia dua surgrimpado unu jaron poste, kiam li trovis la kadavrojn de la pereinto, tute proksime al la pinto de la ĉiam glaciigita Akonkagvo. En tiu libro Tibor priskribis ĉion kion li lernis pri alpinismo, kaj per ĝia publikigo grave kreskis lia populareco en Suda Ameriko, ĉar la libro estis legata kvazaŭ lernolibro pri alpinismo.

Laŭ instigo de sia eldonisto, Tibor entreprenis vojaĝon al ankoraŭ neesplorita regiono de brazila ŝtato Mato Grosso. Kune kun sia edzino Mary Resnik, rusdevena argentinanino, kiu dum kvin jaroj de ilia geedzeco konstante lin sekvis en liaj vojaĝoj, dum unu jaro li vivis inter diversaj indianaj triboj en la fluejo de la riveroj Aragvajo kaj Rio de Mortes. Siajn travivaĵojn li lasis al postaj generacioj en la hispanlingva libro "Tra lando de indianoj" (1946). Samjare li gvidis ekspedicion ankaŭ en la regionon de Patagonio (Argentino), kaj post la reveno li ekstudis en la universitato de Buenos Aires pri etnologio, antropologio kaj arkeologio, akirante en du sekvaj jaroj la necesajn sciojn por siaj postaj ekspedicioj. Li esploris la kanibalajn tribojn en Amazonio kaj verkis etnologie-antropologiajn librojn. Mallonge li vivis en Venezuelo, vojaĝis tra ĉiuj landoj de Meza Ameriko, kaj lia sola fonto de monrimedoj estis verkado kaj prelegoj ĉe fakultatoj kaj aliaj publikaj institucioj. Esperanton, kiel unu el siaj plej gravaj pasioj li neniam forlasis, sed regule tra la amerikaj landoj fondadis societojn kaj asociojn, sen kiuj la historio de Esperanto en tiuj landoj preskaŭ ne ekzistus.

Antaŭ ol li revenis al sia patrujo, li ankoraŭ esploris la historion de Majaok kaj Inkaok. Post 15 jaroj da senhejmula vivo, sen respondeco

al iu ajn krom al si mem, Tibor venis al Beogrado (Serbio) en 1954. Laŭ komisiono de UEA du jarojn poste li partoprenis la ĝeneralan konferencon de Unesko en Hindujo, kaj poste li daŭrigis sian azian turneon tra Ĉinio kaj Nepalo. Pri tiu vojaĝo li verkis originale Esperantan libron "Nepalo malfermas la pordon" (1959). Pro lia engaĝiĝo en fondo de la unua poplola universitato en Nepalo, li ricevis apartan dankon de la nepala reĝo Mahendra.

Tibor ne estis kutima vojaĝanto-turisto, li ĉiam vojaĝis per nekonvenciaj transportiloj, kaj li posedis apartan intuician kaj genetikan deziron ĉiam konatiĝi kun nekonataj kulturoj kaj ĝiaj portantoj. Tial li senrezerve ĉiam lernis lingvojn de la vizititaj popoloj kaj landoj (li parolas pri dudeko da lingvoj, el kiuj dekon da ili li konservis kiel konstantan posedaĵon).

Liajn multajn vojaĝojn grandparte helpis lia konstanta okupiĝo pri Esperanto. En 1960 per Esperanto li vizitis Japanio kaj Foran Orienton, poste sekvis vojaĝo tra Afriko konata kiel "Karavano de amikeco". La impresoj el tiu vojaĝo aperis en la libro "Ĝambo rafiki". Sian konstantan partoprenon en la Unesko-konferencoj kaj Universalaj Kongresoj de Esperanto, li ĉiam uzis por novaj kaj novaj vojaĝoj tra nekonataj landoj kaj regionoj. En 1965 li vojaĝis tra Mongolio, kaj en lia vojaĝitineron ne restis vizititaj nur kelkaj eŭropaj landoj. Li vojaĝis preskaŭ ĝis la lasta vivospiro. Ekde 1972 li vivis en Subotica, kien li venis kiel direktoro de Urba muzeo. En Subotica li ankaŭ finis sian vivon kaj estis enterigita la 23-an de septembro 1988.

"Por iu kiu estas vojaĝanto laŭ sia temperamento, la vojaĝoj havas nek komencan nek finon", li diris foje, kaj li vivis laŭ tiu regulo. Li travojaĝis pli ol 80 landojn, kaj la veran amplekson de lia verkista kaj ĵurnalista laboro, lia dokumenta kaj etnografia notado, verŝajne ankoraŭ longe neniu povos plene difini.

Al la Esperanta literaturo, ĉu originala, ĉu traduka, li lasis multajn librojn: "La trovita felico" (1945), "Nepalo malfermas la pordon" (1959), "Tempesto super Akonkagvo" (1959), "Tra lando de Indianoj" (1970), "Ridu per Esperanto" (1973), "Premiitaj kaj aliaj noveloj" (1974), "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" (1979), "Mondo de travivaĵoj" (1981), "Elpafu la sagon" (1983), "La mondo de Tibor Sekelj" ktp. Li estis eldoninto de pluraj gazetoj: "Geografia Revuo" (1956-1964), "IOE-Gazeto" (poste "Esperanto-Gazeto", 1966-1972), "Velo" (1983-1985) ktp. Liaj artikoloj restis en multaj Esperantaj gazetoj kaj lia originala poezio en "Reeĥoj" kaj "Esperanta Antologio".

Ne povante nombri ĉiujn facetojn de lia vivo, ni diru modeste, ke temis pri nekutime riĉa vivo. Vivi en la sama tempo kaj koni Tibor, estis bonŝanco kaj doto de la sorto.

PAROLADO DE ERZSÉBET SEKELJ SUR TOMBO DE SIA EDZO

Kara Tibor!

Estas nun strange stari ĉi tie kaj laŭte paroli. Mi al kutimiĝis, ke ĉie mi povas rakonti al vi, sed tion mi faras en miaj pensoj.

Neniam mi forgesas viajn lastajn frazojn en la hospitalo antaŭ 20 jaroj: "Mi estas laca. Mi ŝatus dormi. Iru hejmen kaj venu morgaŭ." Sed la sekvontan tagon vi jam ne atendis min. Ni simple ne povis kredi, ke vi fizike ne plu estas inter ni. Tiam ni esperis, ke vi foje revenos, ke vi nur iris ien por "viziti vian farmon". Pasis jam 20 jaroj kaj ni scias, ke via tiama forvojaĝo ne estis via kutima "inspekcia vojaĝo tra la mondo".

Ĉiuj kiuj nun estas ĉi tie bone konis vin, se ne persone, tiam pere de viaj verkoj. Preskaŭ ĉiuj el ni povus rakonti sian agrablan renkontiĝon, aŭ travivaĵon kun vi. Ĉiam estis plezuro paroli kun vi, sed pri vi nun estas malfacile. Ne pro tio, ĉar ne estas kion diri, kontraŭe tiom vi faris, ke ni havas la senton, ke vi vivis la vivon de almenaŭ tri homoj. Anstataŭ ol mi nun parolus pri viva vivovojo (kion la plejmulto bone konas), mi deziras akcenti du plej simpatiajn viajn karakterojn.

1. Bonege vi mastrumis kun la tempo, kaj vi havis tempon por ĉio. Vi havis tempon por studi, por legi kaj lerni, por verki, por instrui, por prelegi, por pensi, desegni, redakti gazetojn, por fondi kaj gvidi Esperanto-societojn, multon labori por disvastigo de nia lingvo. Kaj vi havis tempon por vojaĝi, por telefoni, korespondi, viziti kaj akcepti amikojn, por aŭskulti la homojn, sed vi ankaŭ ŝatis aĉetumi, kuiri, ordigi, amuzi. Vi diris, ke vi estas feliĉa homo, ĉar ĉiam dum via vivo vi faris tion, kion vi ŝatis. Por vi la tuta vivo estis granda amuzo kaj tio rediis el via tuta personeco.

2. La alia estis, ke vi vere ŝatis kaj amis preskaŭ ĉiun homon, aŭ eĉ pli, la tutan naturon. Kompreneble, estis pli proksimaj personoj en via koro, amikoj viaj, sed por vi ne gravis ĉu li aŭ ŝi estas reĝo, prezidanto, direktoro, u grava persono, aŭ simpla ĉiutaga homo. Ne gravis la koloro de sia haŭto, nek la lingvo kiun li aŭ ŝi parolis, nek la religio, nek la aĝo. Same vi kapablis paroli kun la infanoj kaj kun maljunuloj. Kun la sama estimo vi proksimiĝis al ĉiuj. Kompreneble, ankaŭ vi havis malamikojn, sed multegajn amikojn.

Ni estas nur kelkaj el tiuj ĉi tie. Ni venis hodiaŭ por rememori pri vi, kaj danki al vi per unu vorto ĉion. En miaj pensoj mi jam multfoje faris, sed laŭte neniam mi eldiris: "Ni dankas al viaj gepatroj, ke ili edukis tian filon."

Nun ni iros hejmen, sed vi ne restos ĉi tie, ĉar ĉiam kaj ĉie kiam ni pensas pri vi, aŭ parolas pri vi, vi estos kaj restos inter ni.

Subotica, la 20-an de septembro 2008



SUBTENANTOJ DE DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO

Monhelpon al DEC oni povas efektiviĝi kiel
ORA SPONSORO = 1.000 eŭroj
ARĜENTA SPONSORO = 500 eŭroj
BRONZA SPONSORO = 250 eŭroj
Aĉetanto de brikoj = 1 briko = 1 eŭro

Per mono en 2008 subtenis la projekton de konstruigo de DEC jenaj personoj:

1. BRONZA SPONSORO:
Laura Lukač Sancin (Trieste, Italio)
250 eŭroj
2. 10 BRIKOJ
Marija Jerković (Zagreb, Kroatio)
10 eŭroj
3. 20 BRIKOJ
Zlata Nanić (Zagreb, Kroatio)
20 eŭroj
4. BRONZA SPONSORO
Roland Rotsaert (Brugge, Belgio)
250 eŭroj



BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO EN FORTALEZO

✍ José Roberto Alves de Albuquerque

Fortaleza, la ĉefurbo de Cearao, nordorienta provinco de Brazilo, konata al la esperantistaro kiel kongresurbo de la 87-a UK, gastigis la 43-an Brazilan Kongreson de Esperanto de la 12-a ĝis la 16-a de julio 2008. La Kongreso okazis ĉefe en la Didaktika Konstruaĵo de Humanisma Centro de UFC (Federacia Universitato de Cearao). La temo de la Kongreso, "Infano – kia grundo", elmontris la zorgon de LKK pri la ĉi-jare komenciĝanta nova jarcento por Esperanto-movado en Brazilo. Samtempe okazis la Kongreso de la Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj Infankongreseto. Entute aliĝis 330 homoj. Ĉeestis ankaŭ eksterlandanoj el Japanio, Argentino, Germanio, Usono kaj Belgio.

La Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), S-ro José Passini, malfermis la Kongreson en la granda kaj bela subĉiela auditorio de UFC, nomata Akustika Konko. Dum la arta momento, akompanata de sia edzino S-rino Auzineide, prezentis sin P-ro Alvarus Moreno kantante la mondfaman "Akvarelo de Brazilo". Estis omagita la loka 85-jaraĝa

esperantisto P-ro Paulo Amorim Cardoso, kiu plene dediĉis sin al instruado kaj diskonigado de Esperanto. La kantistino Neide Barros Rêgo, el la urbo Niterói, bele kantis muzikon omaĝe al infanoj. Ankaŭ Tarcísio Lima kune kun sia muzika grupo "Quinteto Agreste" kaj ina grupo "Cinco em Ponto" prezentigis al la ĉeestantoj. Fine, forteleza infana grupo teatre prezentis sin per la kortuŝa temo "forlaso de infanoj".

En la Solena Fermo, S-ro Wandemberg Ribeiro Morais, la LKK-prezidanto de la 43-a BKE transdonis la Esperantan Flagon al S-rino Ângela Faria, la LKK-prezidantino de la venonta Kongreso de Esperanto en la minasa urbo Juiz de Fora.

Speciala momento de la Kongreso estis la meso celebrata de la Pastro Peter Knauer, el Belgio, en la Preĝejo N.S. dos Remédios.

Sub reĝisorado de Ivaldo Alves de Sousa, oni prezentis la kongresan temon dum tri sesioj. Ivaldo Alves de Sousa parolis pri "Infanoj en la movado". José Mário Marques prezentis temon rilate al la "Familia uzo de Esperanto kaj Esperanto en Lernejoj" kaj la paro

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia prelegis pri sia sperto ĉe Lernejo-Bieno Bona Espero kaj prezentis filmon pri ĝi okaze de vizito de la nepo de Zamenhof.

Jair Salles riĉigis la eventon per sia grava kaj tradicia ĉekongrese Baza kurso de Esperanto kaj Rodrigo de Carvalho Mendonça per sia divenludo "Paroliga ĉambro - Ludu per bildoj!", paroligis la ĉeestantojn.

Geraldo Mattos, eksprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj verkisto, prelegis dufoje, pri: "Esperanto kaj ĝiaj du dialektoj" kaj "Diferencoj inter Esperanto kaj etnolingvoj", kaj Paulo Sérgio Viana prelegis dusesie pri la temoj "Ĉu mia konscienco anesteziigis?" kaj "Machado de Assis post cent jaroj". Li ankaŭ lanĉis nome de Eldonejo Lorenz la ĉiujaran eldonatan libron "Almanako Lorenz 2008" kaj plian kolekton de elektitaj rakontoj.

Pri "Esperanto kaj aliaj Planitaj Lingvoj" parolis la nuna prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo José Passini.

Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo lanĉis la libron "Poesias Escolhidas do Brazila Esperanta Parnaso" kaj

reprezentis la libron "Brazila Esperanta Parnaso, lanĉitan dum la Brazila Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro pasintjare. Sylla Chaves ankaŭ prelegis pri la temo "Esperantonimoj, regulo 15 kaj esperantigo de brazilajoj" kaj sekve lanĉis la libron "Oportuna Poŝvortaro".

La loka samideano José Leite de Oliveira Jr. prelegis pri tri temoj: "Postsignaj Notoj pri la Esperanto-Movado en Cearao", "Esperanto laŭteme: kultura instrumentado por enkonduko en Esperantujn" kaj "Interligvistika Revuo (ILR)".

BEJO elektis novan estraron kaj aljuĝis la premion "BEJO-Ataŝeo" al Dominique V.C. Santos. Gravaj momentoj kadre de BEJO-kongreso estis la virtuala konferenco de Emílio Cid, rekte de Santos, kaj la perreta konversacio inter la kongresanoj de la Brazila Kongreso en Fortalezo kaj tiuj de la Tuta Amerika Kongreso en Montrealo. Same gravis la prelego "Senlima kaj tuta ekumenismo de Legio de Bona Volo", de la junulo Felipe de Oliveira Duarte Pereira.

La infanan kongreseton kontribuis multaj junaj helpantoj.



LA UNUA DIĜITIGITA GAZETO EN KROATIO

Josip Pleadin

Komence de junio ĉi-jare en Kroata ŝtata arkivo en Zagrebo estis prezentita interreta portalo "Kroata kultura heredaĵo" (www.kultura.hr), interreta kolekto de arkivaj, bibliotekaj kaj muzeaj diĝitaj kolektoj kaj diĝitigitaj materialoj. Elstaran lokon en tiu portalo okupas ankaŭ la unua diĝitigita gazeto en Kroatio - "Glas Podravine". Pri la portalo la kulturministro mr Božo Biškupić diris, ke la celo de ĉi-tiu portalo estas diskonigo de kroata kultura heredaĵo per uzado de la plej modernaj teknologioj kaj procezoj de diĝitigo, per kio Kroatio aliĝis al landoj kiuj certigas la plej vastan alireblon al sia kultura heredaĵo pere de interreto. La projekton realigas Ministerio pri kulturo kunlabore kun Nacia kaj universitata biblioteko, Kroata ŝtata arkivo kaj Muzeo dokumenta centro. La regiona Biblioteko "Fran Galović" el Koprivnica, kandidatigis por ricevi subtenon por diĝitigo de la plej malnova gazeto de sia regiono, kiu kontinue aperas ekde 1950. La kunlaborantoj de la projekto estis Muzeo de urbo Koprivnica kaj la entrepreno "Glas Podravine", kaj finance ebligis ĝin Ministro de kulturo kaj la Urbo Koprivnica.

Kiam la diĝitigitaj paĝoj de ĉiuj numeroj de "Glas Podravine" ekde 1950 ĝis 2007 aperis en la nomita portalo, ni provis testi, kion ni trovos rilate Esperanton. Ekzistas ebleco vidi la paĝojn de la gazeto en sia presa formo, sed en malpli granda kvalito, tamen sufiĉa por surekrana legado. Alia elekto permesas kopii la tekstojn de ĉiu unuopa

artikolo en sia kruda formo. La kopiitaj tekstoj do bezonas poluradon kaj forigon de skanaj eraroj, sed efektive temas pri tute bona solvo.

La tutan arkivon de "Glas Podravine" eblas traserĉi ankaŭ laŭ ŝlosila vorto. Kiam ni tajpis la vorton "Esperanto", ni tuj ricevis liston de ĉiuj artikoloj kiuj mencias Esperanton en kiu ajn senco, kun informoj en kiu numero kaj sur kiu paĝo la nomitaj artikoloj troviĝas. En kazo de Esperanto, efektive temas pri 61 artikoloj kiuj aperis inter 1950 kaj 2007, kun diversaj temoj. En la jaroj 1942-1955 temas pri intensa aktiveco de esperantistoj en vilaĝo Hlebine, pri ilia instruisto Vilim Čop kaj pri (imagu!) malgrandaj pupistoj en la loka lernejo kiuj kun siaj pupteatraĵoj partoprenis la jugoslavian kongreson en Novi Sad kaj SAT-kongreson en Dortmund. En la 1955 la gazeto mencias Esperantan aktivecon en la gimnazio de Koprivnica, inter 1966 kaj 1970 plurfoje raportas pri Esperanto-societo en Koprivnica, en 1979-1980 per pluraj artikoloj priskribas la vigan Esperanto-aktivecon de Zdravka Metz, en 2000 per kelkaj artikoloj mencias la 4-an kongreson de kroataj esperantistoj en Đurđevac, en 2003 la koncerton de A. Korobejnikov en Virje. Aparte interresaj estas intervjuoj kun esperantistoj: Ilija Gabaj (1966), Đuro Rašan (1968), Alen Gregurek (1971), Franjo Petročević (1972 kaj 1988), Josip Mesar (1977, Zdravka Metz (1979), Stjepan Krčmar (1988), Antun Šimunić (1988) kaj Mladen Šerment (1989). Pluraj tekstoj parolas pri aperinta libroj kaj libroprezentoj.

La portalo estas vizitebla ĉe: www.kultura.hr/hr/zbirke/digitalizirane_novine_glas_podravine

KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

34-a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Sabadell, de la 6-a ĝis la 8-a de decembro 2008 (vidu: <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2008/>) La katalunaj kongresoj de Esperanto kunigas altnivelajn prelegojn kaj riĉan artan programon kun unuarangaj gastoj el diversaj mondopartoj. Krome, okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj, la semajnfino antaŭ la kongreso okazos serio de prelegoj kaj rondaj tabloj en la kataluna pri lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj lingvoj kaj paco fare de reprezento de elstaraj katalunaj organizoj.

Ci-jare la kongresa prelegaro ĉefe turniĝos ĉirkaŭ la temo "Esperanto kaj tutmondigo: perspektivoj por la estonto". La kongreso celas aparte atenti pri la celoj de esperantismo en mondo pliimplektiĝanta ekonomie, kulture, lingve, ideologie kaj loĝe, tamen ĝi atentos ankaŭ aliajn temojn por doni pli grandan diversecon al la prelegoj. Inter la konfirmitaj prelegantoj elstaras la partopreno de Humphrey Tonkin, Ghiridar Rao, Abel Montagut... Krom programero pri muziko kun la partopreno de la diskeldonisto Floreal Martorell koncertos ankaŭ la Esperanto-muzikistoj Alejandro Cossavella kaj Martin Wiese. Ankaŭ elstaras en la distra programo la dancigo de internaciaj popol-dancoj far la danc-instruisto Mon Cardona kaj la kvalita teatraĵo de Tuluza Teatra Trupo.

UNIVERSALA KONGRESO EN 2010 EN KUBO

La ĝenerala sekretario de UEA Barbara Pietrzak, en la solena fermo de la roterdama UK, anoncis la decidon de la estraro de UEA, ke la Universala Kongreso de Esperanto en 2010 okazu en Kubo. Tian evoluon de la elekto oni antaŭsentis ankaŭ pli frue, kvankam multaj pledis po Rusio, se pro nenio alia, tiam pro la fakto ke rusoj kiel granda



Maritza Gutiérrez en Roterdamo senpere antaŭ la proklamo ŝajnis tute trankvila

Esperanta nacio neniam gastigis UK-on. Kiel ĉefaj kaŭzoj de la elekto de Havano, montriĝis la multekosteco de Moskvo kaj la principa sinsekvo de eŭropaj kaj ekstereŭropaj kongresoj. Tamen, oni ekscias ankaŭ, ke du elstaraj rusiaj esperantistoj turnis sin al la estraro de UEA kaj malrekomendis kongresi en Moskvo en la nunaj cirkonstancoj. Ne estis publike klarigite pri kiaj cirkonstancoj temas, sed onidire ja temas pri malkonkordo inter rusiaj Esperantaj organizaĵoj. Kio ajn estis la kaŭzopor elekti Havanon, ni ĝoju reviziti Kubon, esperante ke Moskvo ankaŭ estonte ricevos sian ŝancon.

PROBLEMOJ EN ILEI

Dum la UK en Roterdamo okazis fermita kunsido de la reprezentantoj de UEA kaj la estraro de ILEI, pro la krizo kaŭzita per konflikto en la estraro de ILEI post kiam Zsófia Kóródy en junio estis eksigita el sia posteno. Post tio la estraro de ILEI informis, ke la eksigita vicprezidantino ne plu havos la taskon labori pri la nova ekzamen-sistemo de ILEI, al kio forte kontraŭstaris Mireille Grosjean, la prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono. La konflikta situacio klare montriĝis en la publika kunsido de ILEI la 22-an de julio. En la fermita kunsido de UEA kaj ILEI, la reprezentantoj de UEA konfrontiĝis kun ILEI pro la eksigo de vicprezidantino de ILEI Kóródy. Laŭ iuj fontoj montriĝis, ke la eksigon faris arbitre Atilio Orellana Rojas, la ILEI-sekretario. Fine de la kunsido UEA reprezentanto, agnoskinte la grandan laboron de la eksigita vicprezidantino, tamen deklaris ke UEA ne miksiĝos en la internajn aferojn de ILEI. La interna konflikto de ILEI ne estis solvita ankaŭ en la

ilei



ILEI-anoj konferencis en 2008 en Benino

ILEI-konferenco en Benino pro multkapa foresto de la estraranoj. Dume cirkulas diversaj opinioj pri la konflikto kaj estas atendata ĝia definitiva solvo ene de ILEI.

PASPORTA SERVO REORGANIZOTA

Dumjare en la reto okazis ampleksa diskuto pri la problemoj kiujn alfrontis "Pasporta Servo", la plej populara aktiveco de TEJO. La problemoj akriĝis kiam ĉi-jare multaj membroj de la gastiga servo ne ricevis sian paperan ekzempleron de la adresaro. La komitato de TEJO kolektiĝis en sia jarĉefkunveno de Szombathely dum la 64-a Internacia Junulara Kongreso kaj decidis fundamente renovigi la popularan gastigantan servon, kiu ĝis nun konsistis ĉefe el la papera adreslibro. Estontece TEJO planas formi dinamikan interretan datumbazon kiu plifaciligos la servon. Kvankam iuj membroj de TEJO postulas kompletan forigon de la papera eldono, nomante la uzantojn de libreto "dinosauroj nekapablaj vivi en moderna tempo", ŝajnas, ke Pasporta Servo daŭre konservos ankaŭ sian tradician veston, kiun ĝi flegis dum pli ol 20 jaroj. Multaj subtenas tiun solvon, ĉar laŭ opinio de tiuj, pli facilas propagandi kaj ofte ankaŭ uzi ĝin en foliumebla vesto.

VEGETARANOJ EN DRESDENO

De la 27-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazis en Dresdono la 38-a Vegetarana Kongreso. Inter 600 partoprenintoj el 30 landoj troviĝis ankaŭ tri estraranoj de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio: Christopher Fettes, Francesco Maurelli kaj Heidi Goes. La prezidanto de TEVA, Christopher Fettes la 28-an de julio parolis pri iternacia amikeco de vegetaranaj familioj pere de Esperanto. Dumkongrese okazis ankaŭ kurseto de Esperanto kiunpartoprenis diverslandaj vegetaranoj. Bone funkciis ankaŭ la kongresa Esperanta stando. Fotoj de la

kongreso videblas en www.ivu.org/teva



Esperantista stando en Dresdono

E-LIBREJO PRESKAŬ MALAPERIS

Janko Luin, la filo de la idea fondinto kaj gvidinto de E-librejo Franko Luin, dumsomere anoncis, ke li ne plu havos rimedojn por vivteni la konatan retejon esperantujo.org. Post lia publika deklaro, estis preskaŭ certe, ke centoj da kvalitaj pdf-libroj malaperos kaj ke la grandega laborinvesto perdiĝos poreterne. La solvo tamen estis trovita dank' al Zhang Xuesong el Ĉinio, kiun en sia persona retpaĝo en www.ipernity.com ebligis senpage elŝuti la librojn de e-Librejo. La 14-an de septembro haveblis entute 188 libroj en tiu kolekto. La listo estas prilaborata kaj novaj titoloj estas kompletigitotaj.

RETAJ LERNINTOJ KUNVENIS AŬGUSTE

Nutempe multas personoj kiuj eklernas Esperanton per interreto. Speciale grava plimultigo de esperantistoj okazis danke al la paĝaro www.lernu.net. Ĉi-jare la interretaj lernantoj por la unua fojo kunvenis dum Somera Esperanto-Studado (SES) en slovakia urbeto Modra-Harmónia. Inter la 9-a kaj 17-a de aŭgusto 105 personoj el 25 landoj, en aĝo inter 3 monatoj kaj 90 jaroj partoprenis tiun aranĝon. Por la venintoj SES estis bona startpunkto por plia Esperanta vivo. Helpis al ili pluraj instruistoj, kiuj konigis al ili diversajn erojn de Esperanto. La

plej altan nivelon gvidis Bertilo Wennergren, la komencantojn prizorgis Stano Marček, dum la ceterajn instruis Dalia Pileckienė, Petra Šmideliusz kaj Birke Dockhorn. La partoprenintoj ricevis fine de la aranĝo atestilojn pri 26-hora kurso laŭ la niveloj de nova referencadro de A1 ĝis C1. La aranĝon kunfinancis Esperantic Studies Foundation.

UEA ĈE HOMRAJTA KONSILIO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Universala Esperanto-Asocio ĉeestis aktive en la tritaga Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj en Genevo komence de septembro. La Socia Forumo ĉefe traktis la malriĉecon en la mondo. Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis tuttempe Charmian Common kaj Stefano Keller, kaj en la unua tago Cesco Reale. Je du okazoj reprezentintoj de UEA intervenis alparolante la Forumon. UEA ankaŭ ricevis ŝancon aparte prezenti al la Homrajta Konsilio sian vidpunkton pri lingvaj homaj rajtoj. UEA havas la rajton sciigi siajn starpunktojn al tiu grava organo de Unuiĝintaj Nacioj pro sia oficiala statuso de Nergistara Organizaĵo en specialaj konsultaj rilatoj ĉe UN.

FORPASIS GÜNTHER BECKER

emerita instruisto (naskiĝinta en 1930) forpasis la 18-an de aŭgusto 2008 en Zweibrücken. Aktiva esperantisto ekde 1951, li estis prezidanto de TEJO (1956-1964), ĝenerala sekretario de UEA, prezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo (1957-1973). Kune kun profesoro Max Mangold, la konata sarlanda fonetikisto kaj fonologo, li produktis dum pluraj jaroj radioelsendojn por la Publika Kanalo de Saarbrücken pri la didaktiko de lingvolernado. Li fondis la "Becker-Meisberger-Instituton", por ke la kreaĵoj de la edzino Maria kaj li restu konservitaj, kune kun la ampleksa biblioteko kaj arkivo de ĉiuspecaj aŭdvidaj materialoj.

ALIA MONDO EBLAS: TOK-TOK-TOK ...

Vojaĝnotoj okaze de SAT-kongreso en Kazanlak (Bulgario), 2008

  **Etel Zavadlav**

La ĉi-jara SAT-kongreso okazis en la bulgara urbo Kazanlak. La partoprenantoj ne kolektiĝis tre multnombro, kio ebligis preskaŭ familian etoson.

Organizantoj investis multe da zorgo kaj forto en la eventon, kiu atingis kontentigan nivelon. Ĝi komenciĝis solene, kun gaja muziko, danco kaj bongustaj bulgaraj frandaĵoj.

Kutime vojaĝo signifas aventuron kun neeviteblaj surprizoj. Mi vojaĝis el Split per buso al Beogrado, kie mi profitis la okazon ĝui la akompanon de tre afablaj kaj karaj beogradaj geamikoj esperantistoj. Sinjorino Terezija Kapista bonege gastigis min en sia bela loĝejo, amuzigis min per siaj instruemaj rakontoj el sia riĉa vivsperto kaj travivaĵoj ene de Esperantujo. La postan tagon alvenis grupo de francaj kamaradoj kiuj ankaŭ restis en

Beogrado. Postmorgaŭ mi aliĝis al ilia grupo, kaj kune kun kelkaj serbaj kaj hungaraj gekamaradoj ni daŭrigis la grupvojaĝon ĉirkaŭ 15-personan. La grupo estis ege interesa laŭ sia strukturo: SAT-anoj de ĉiuj generacioj, ekde 10-jara knabeto ĝis personoj en estiminde matura aĝo. Iu bravulino kunportis botelon da memfarita "ĉeriza brando", kiun mi trinkis, ne simpla alkohola trinkaĵo, sed eliksiro kaj medikamento

La trajno per kiu ni vojaĝis estis terura, kompreneble, aparte post bonaj spertoj en svisaj kaj francaj trajnoj; sed la gajeco, bonhumoro kaj humuro de la grupo forigis ĉiujn mankojn. Mi eĉ ne rimarkis, ke ni malfruas preskaŭ ...nu ja, nur 7 horojn. Anstataŭ je la 7h30 matene, ni alvenis en Sofion post la 14h00 posttagmeze. Sed vere ne gravas! Kuŝante sur bretoj en neklimatigita trajno, ni estis sufiĉe salitaj kaj bonguste rostitaj;

jes, mi sentis min kiel rostita frandaĵo en ŝvita saŭco. Sed vere ne gravas! Dumvoje oni kantis, ridis, ludis, rakontis ŝercojn, kaj la reganta etoso vikle rememorigis min pri iamaj tempoj de frateco kaj unueco. Dum serbaj infanoj kantis tiom milde kaj belsone, mi ne plu volis deteni larmojn - ĉu vere necesis ke tiuj du popoloj interbuĉu kaj forverŝu tiom da sango? Hontinda afero, hontenda historio.

Nu, mi ne volas spici ĉu tiun raporton per miaj larmaj sentimentaj, kvankam mi esperas, ke plejmulto da legantoj samopiniis kaj samsentas kun mi.

Finfine, ni alvenis Sofion, eĉ ne tro elĉerpitaj. Post unuhora paŭzo en la sofia stacidomo, ni daŭrigis la vojaĝon rekte al Kazanlako. Tiu trajno estis multe pli moderna kaj agrabla. Mi eĉ miris pri ĝi. Sur la kajo de Kazanlako nin atendis kelkaj hejmmastroj el la OKK kiuj afable nin kondukis al nermalproksima hotelo.

La unuaj impresoj pri Bulgario (en Sofio ni ne eliris la stacidoman konstruaĵon) prezentigis per bildo de ĉevaloj surstrate tirantaj ĉarojn, per homoj tute trankvilaj apud la ĉevaloj. Ritmo de ĉevalaj hufoj sonis tra la strato - tok-tok-tok... Tio estas la unua bildeto bulgara, kiu tuj rememorigis min al la slogano de Monda Socia Forumo:

Malsupre: scenoj el Bulgario.



"Alia mondo eblas". Ĉu tio estas alia mondo, la mondo kiu ŝparas nafton, aŭ simple ne havas ĝin? Se jes, mi bonvenigas tian mondon! Ĉevaloj ne povas kaŭzi terurajn trafikakcidentojn. Alia mondo eblas, alia mondo eblas, tok-tok-tok-tok ... senĉese resonis en mia kapo, en ritmo de ĉevalaj hufobatoj.

Alia mondo eblas - almenaŭ teorie. Bulgario rememorigis min al Kenjo. Multas similecoj inter tiuj du landoj. Intime mi nomis Bulgarian "blanka Kenjo". Kun diferenco, ke Kenjo estas teritorie ekster atingo de Reĝino Eŭropo, kaj verŝajne restos indulgita de ŝia molestado. Male al Bulgario.

La kongreso komenciĝis, ni havis agrablan veteron, sed tio ne estis ĉefa kialo por alveni kaj renkontiĝi kun samideanoj. Ni venis celante ŝanĝi la mondon. Ho, jes - alia mondo eblas - se oni ĝin deziras. Almenaŭ por montri iom da rezisto al ĉefregantaj komercmerkataj mondaj fluoj de profito kaj kapitalisma muelmaŝino. Ni do ankaŭ laboris en laborkunsidoj, aŭskultis interesajn prelegojn pri diversaj socipolitikaj fenomenoj kaj eventoj mondwide.

Kun certa kontento mi rimarkas plijuniĝon de SAT-membraro, kaj nun eblas konstati, ke saĝeco de blankaj kapoj estas akompanita de vigleco de kelkaj vere junaj kaj sindonemaj personoj, kio certe plifortigos SAT kiel organizon.

Okaze de iu prelego kiun postsekvis libera diskuto, mi starigis demandon al bulgara prelegantino:

"Ĉu aparteniĝo al Eŭropa Unio progresigis ilian landon iumanierne?"

La respondo estis negativa. Negativa, karaj legantoj, plene negativa. Negativa ĝisoste - ili estas ege seniluzigitaj, senrevigitaj kaj ĉagrenitaj per aroganta konduto de Eŭropa Unio. Ni ĉiuj rememoru tion - kvankam tiu sklaveco ŝajnas brila celo, ĝi havigas al ni mastron



Bierumante kun junaj francaj SAT-anoj.

kaj posedanton. Tra bulgaraj stratoj vagadas multnombra almozularo. Iliaj vendejoj similas al tiuj el prasocialisma epoko, kiajn mi eĉ ne rememoras, krom el partizanaj filmoj. Salajro de ingeniero egalas al 200-250 eŭroj. Averaĝa pensio estas malpli ol 50 eŭroj. Ili vivas tre modeste, multe pli modeste ol povraj kroatoj kiuj strebegas eniri la diablan rondon kiu starigas senlimajn kondiĉojn kaj ultimatojn, lasante Kroation ĉiam antaŭ pordo, kiel Cindrulino, kun amara gusto en la buŝo. Bulgaroj vivas ankaŭ pli modeste ol serboj, kiuj tamen montras certan reziston al eŭropa varbado. Ege plaĉis al mi vidi en Knez Mihailova strato multajn murskribaĵojn kaj glumarkojn kun krucstrekitaj EU-literoj. Kial nia ŝafaro estas tiel obeema; ion similan mi rimarkis nek en Split nek en Zagrebo.

Alia mondo eblas, mi vidis surloke. Eblas en ĉiuj direktoj, kaj ĉiu ŝanĝo havas sian prezon. Ĉu ni certas ke ni deziras alian mondon? Probable jes. Kian? Ĉu ni kapablas nin organizi en lukto celanta tiujn ŝanĝojn? Lukto, strebo, batalo, inklino ... Ĉu ni pretas investi proprajn fortojn, propran tempon por plibonigo de monda scenejo? Aŭ plaĉas al ni

partopreni pasive la ruladon de muelrado kiu mortigas amasojn kaj nian domon, planedon Teron mem? Neniu klera persono ĝuas tion, kaj inteligentaj unuopuloj ĉiam havas ideojn kaj rimarkojn tiuteme.

Interalie, mia kontribuo al la kongresa programo estis prelego pri monda malsato. Nenio nova - afero konata jam de jardekoj aŭ jarcentoj?

La kongresaj tagoj en agrabla hotelo, inter afablaj personoj rapide pasis. Laŭ kutimo, la adiaŭa vespero pasis iom triste. Ĝis la sekva kongreso en 2009, ĝis Milano!

Mi invitas ĉiujn legantojn alveni tiutempe Italian, ĉar etoso certe estos multe pli bona, kaj loĝado pli agrabla ol en Universala Kongreso. Tute certe. Venu almenaŭ kiel gastoj kaj ĝuu kamaradecan etoson de SAT organizo.

Kaj tiujn kiuj deziras ŝanĝi la mondon, mi bonvenigas al Sennacieca Asocio Tutmonda. Oni povas aliĝi ĉe la peranto, kiu ĵus finskribas ĉi-tiun tekston (etel.zavadlav@gmail.com).

Alia mondo eblas, alia mondo eblas, tok-tok-tok, tok-tok-tok ...

ĈU ESPERANTISTOJ EN NORDA KOREIO?

Kiam la pola etrepreno Esperantotur publikigis informon pri la planata vojaĝo al Norda Koreio kun eventuala renkontiĝo kun lokaj parolantoj de Esperanto, temis pri unuaranga sensacio, ĉar jam de kvardek jaroj nenio estas konata pri Esperanto en tiuj azia lando. Fortan baton la movado en Norda Koreio spertis tuj post la Korea mlito, kiam estis elpelita el la komunisma partio Pak Hunyung, eksa viĉĉefministro de Norda Koreio kaj iama elstara aktivulo de la Esperanto-movado. Li estis arestiti kaj mortkondamnita kiel spiono de usona imperiismo en la Zamenhofa tago, la 15-an de decembro 1955, kaj ekzekutita kredeble la 20-an de decembro. La Esperanto-movado en la 1950-aj jaroj tamen revigliĝis. En 1959 estis fondita (Norda) Korea Esperanto-Asocio, kies prezidanto estis Song Bong Uk, la tiama ministro pri financoj. En 1964 la asocio eldonis 350-paĝan vortaron de Esperanto aŭtoritan de Kim Hyungro. La sola konata ligo inter Esperanto kaj Norda Koreio dum la lastaj jaroj estis Asocio por Amikeco kun Koreujo (KFA), fondita en 2000. Ĝia retejo estas registrita en Hispanio kaj havas kelkajn esperantlingvajn paĝoj kiuj subtenas la linion de la nordkorea registaro. "Libera folio" klarigas la aferon pri la vojaĝo reklamata de Esperantotur. Laŭ la programo, la vojaĝantoj unue vizitos Ĉinion kaj tie ricevos vizon por Norda Koreio. Laŭ tiu reklamo, en Norda Koreio la turistoj spertos du hotelajn tranoktojn en Pjongjango, promenon tra la urbo, ekskurson al la 38-a latitudo, kaj "eventualan" renkontiĝon kun esperantistoj. La organizanto de la vojaĝo, Andrzej Grzebowski rakontas, ke oni planis la vojaĝon jam de kelkaj jaroj, sed neniam kolektiĝis sufiĉe da klientoj. Nun la kvanto da klientoj sufiĉas por realigi la vojaĝon, kiun prizorgas Liu Jianguo en Dandong, kie la esperantistoj havas Esperanto-

kontaktojn kun Norda Koreio. Por scivolemuloj, jen la adreso de la retejo de Asocio por Amikeco kun Koreujo (KFA): <http://www.korea.dpr.com/users/esperanto/>.

GAZETA WYBORCZA KAJ LUMDISKO "ESPERANTO"

La 10-an de septembro kiel aldonajo en la grava pola tagĵurnalo "Gazeta Wyborcza" kun 364.000 ekzempleroj, en ĉiuj eldonoj kiel senpaga aldonajo, al la llegantoj estis donacita lumdisko titolita "Esperanto". La aperigon de la disko finacis la urbo Bjalistoko kaj kreis ĝin la organizajo E@I, prizorganto de la projekto lernu.net kaj aliaj. La disko en luda formo informas pri Esperanto. Kvazaŭ promenante tra virtuala Bjalistoko oni vizitas diversajn konstruaĵojn, el kiuj ĉiu havas apartan signifon kaj utilon (Lernejo, Kinejo, Muzikejo, Gazetĝiceto, Esperanto-muzeo ktp. Se vi volas havi la diskon, plej facilas viziti: www.espero.bialystok.pl, kie vi povas trovi informojn kiel mem produkti ĝin, ĉar la originala aperinta en Gazeta Wyborcza ne plu haveblas pro la granda intereso de aĉetantoj.

11-a INTERNACIA FOTOKONKURSO

La redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la dek-unua Internacia Fotokonkurso. En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15x20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj. La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, **Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando)**. La fotoj devas atingi la sekretariojn antaŭ la 1-a de decembro 2008. La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per

pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj. Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj: 1) 50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" en 2009, 2) 25 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" en 2009, 3) Abono de "La Ondo de Esperanto" en 2009. Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto") por la plej bona foto pri la temo "Vizaĝoj". Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en "La Ondo de Esperanto". La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31-a de decembro 2010 ekskluzivan rajton uzi la ricevitaĵojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

ESPERANTO EN EKONOMIA FORUMO EN KRYNICA

Inter la 10-a kaj 13-a de septembro okazis la 18-a Ekonomia Forumo en Krynica, alinomata "Pola Davos", en kiu jam la trian fojon Esperanto estis reprezentata. Partnero de la aranĝo estis Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu elpaŝis kun propra podia diskuto kaj ankaŭ prizorgis dum la tuta aranĝo informstandon pri Esperanto. Ĉi-jare la Esperanto-ĉeeston en la forumo kunfinancis tri organizoj – EEU, Universala Esperanto-Asocio kaj Esperantic Studies Foundation. Inter la personoj kiuj ricevis informon pri Esperanto estis antaŭa prezidanto de Pollando, Lech Wałęsa. La Ekonomia Forumo en Krynica estas altnivela aranĝo, kiun kutime partoprenas multaj decidpovaj personoj – politikistoj, ekonomiistoj, entreprenistoj, diplomatoj - ĉefe el meza Eŭropo kaj Azio.

INTERNACIAJ PERRETAJ ESPERANTO-KURSOJ KAJ ATESTILO DE FAMA UNIVERSITATO - POR ĈIUJ

 *Malgorzata J. Komarnicka*

En Jagelona Universitato en Krakovo, ekde novembro 2007 ĝis junio 2008 okazis oficiala E-kurso, kies aŭtorino kaj gvidantino estis Maria Majerczak – filologo kun ĉirkaŭ 10-jara sperto en Esperanto-instruado en ĉi tiu universitato. La koncepto de la kurso, proponita de la aŭtorino estas senprecedenca en la historio de tiu mondfama, 650-jara universitato.

La kurso havas tre bonan teorianton bazon. La gramatiko inkluzivas studadon de la akuzativo, artikolo, participoj, kunmetitaj tempoj, sintaksaj strukturoj kaj ĉio necesa por konstrui lingvan kompetenton. Dank' al la programo de la kurso kaj lingva trejnado per novinventitaj metodoj, alproprigo de la materialo okazigas rapidan progresadon. Variaj metodoj uzataj dum la ĉeesta kaj ekstera studado, kaj ankaŭ moderna eksplikado de gramatikaĵoj donas al la studentoj unikan okazon plibonigi sian nivelon de la kono de Esperanto.

La universitataj Esperanto-kursoj estas disponigataj ne nur al la lokaj studentoj, sed ankaŭ al aliurbaj kaj alilandaj partoprenantoj. En 2007/2008 krakovaj studentoj partoprenis la superan kurson ĉeeste, ĉiusemajne. La ceteraj studentoj lernis koresponde, pere de Interreto. La kursgvidantino laboris individue perrete (voĉe) kun ĉiu kursano, por ke li povu praktike trejniĝi pri la koncernaj

programeroj.

La studentoj ricevis pere de la reto la materialojn: tekstojn, ekzercojn, komentojn, ankaŭ sommaterialon, fotojn k.a., laŭ difinitaj temoj. Ili studis la lecionon kaj post kelkaj tagoj sendadis la taskojn. Do, ĉiuj grupanoj laboris samritme. Estis uzata ret-telefono. Krom farado de ĉiusemajnaj skribaj taskoj: i.a. redaktaĵoj, gramatikaj ekzercoj, oni lernis parkere modelajn frazojn kaj teksto-fragmentojn. Unufoje dum semestro ĉiuj studentoj havis eblecon partopreni tritagano, pli ol 20-horan (fakultativan por nelokaj studentoj), ĉeestan studsesion. Valoras aldoni, ke estis trovita teknika solvo, por ke partoprenantoj, kiuj ne povis ĉeesti la studsesiojn, povu akiri la praktikajn kapablojn, kiujn oni trejnus dum tiuj studsesioj. Por ni, studentoj, grava estis manko de jarlaboraĵo. Ĉiuj taskoj, skribaj kaj parolaj konsistigis la programon de la fina ekzameno. Do, dum ĉiu leciono oni prepariĝis al la ekzameno. Tiu por kelkaj personoj okazis perrete. Reta ekzameno estis ebla dank' al speciala ekzamenarango. Du kurso-partoprenantoj ekzameniĝis dum la UK en Roterdamo.

Finante la kurson la studentoj ricevis atestilon ("Certyfikat") de la plej fama pola universitato (kie inter aliaj multegaj elstaraj personoj studis ankaŭ Nikolao Kopernik kaj la

posta papo, Johano Paŭlo la Dua). La "Certyfikat" ne estas diplomo. Tio estas atestilo konfirmanta lingvoscion je difinita nivelo.

Dum la ĉeestaj sesioj la gestudentoj multe ekzerciĝis pri la Esperanta elparolo, morfologio, sintaksaj strukturoj, leksiko kaj parolado.


Gramatikaj malfacilaĵoj de la studentoj estis korektataj kaj eksplikataj per variaj lingvaj ekzercoj, ludoj, kantoj kaj interesaj konkursoj. Estis uzataj diversspecaj interesaj materialoj kaj instrumentadoj. Inter nekonvenciaj rimedoj faciligantaj la lernadon de Esperanto aperis ekzemple danco, kiu favoras memorigon de multaj vortoj pri la diversaj aspektoj de homo (temperamenta, spirita, emocia, socia, k.a.) kaj komuna gvidata voĉa teksto-produktado – rimedo por rapide lerni novajn, malfacilajn vortojn kaj strukturojn.

La lecionoj estis variigitaj per aŭskultado de riĉtekstaj kantoj kaj per ekzercoj akompanantaj unu longan kanton. Al ŝatantoj de ĵurnalismo la instruistino proponis redaktekzercojn. La partoprenantoj de la studsesioj efike pliprofundigis sian lingvokonon.

En oktobro 2008 denove komenciĝos perretaj E-kursoj: supera kurso kaj ankaŭ mezgrada. Ĉiu povas aliĝi por profiti la eblon plibonigi kaj ordigi sian lingvoscion. La kandidatoj jam estas akceptataj. Oni povas aliĝi je la adreso: **esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com**

Informoj pri la supera kurso - aktualaĵoj, unu leciono, fotoj, listo de la partoprenintoj de la unua kurso k.a. - troveblas en la retpaĝo: **<http://www.esperanto-reto.org>** - bonvolu alklaki: Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona Universitato.



 Josip Pleadin





"Vinkovačke jeseni"
 (Aŭtunoj de Vinkovci),
 estas tradicia folkloro
 festivalo en la slavonia
 urbo Vinkovci, kiu jam 43
 jarojn okazas en la unu
 duono de septembro.
 Temas pri la plej granda
 kaj la plej konata folkloro,
 kultura kaj turisma
 manifestacio en la orienta
 parto de Kroatio, kiun
 ĉiujare vizitas folkloraj
 ensembloj el tuta lando.
 Unuafoje la festivalo
 okazis en 1966, komence
 kiel festivalo de origina
 slavonia folkloro. En 1970
 la unuan fojon alvenis
 ensembloj de burgenlandaj
 kroato, rutenoj kaj
 ukrainanoj. Ekde 1977



la festivalo fariĝis mani-
 festacio de originala
 folkloro de popoloj kaj
 minoritatoj de Kroatio.

La plej bela parto
 de la festivalo estas
 procesio de ĉiuj ensembloj
 tra la urbaj stratoj, kiu
 daŭras dum horoj.

Ekde 1970, enkadre
 de la festivala programo,

okazas ankaŭ parto por
 ensembloj kaj dancgrupoj
 de infanoj, kaj pure loka
 festivalo fariĝis tutlande
 konata renkontiĝejo de
 folkloristoj, dancistoj,
 kantistoj kaj muzikistoj,
 kulturuloj kaj ŝatantoj de
 naciaj kantoj, dancoj kaj
 kostumoj.

Ĉi-jare en la in-
 fana parto de la festivalo
 prezentiĝis eĉ 64 ensem-
 bloj, kaj parton de la varma
 atmosfero el la urbaj
 stratoj peru al vi la ĉi-
 apudaj fotoj.

Se foje vi troviĝos
 en Slavonio komence de
 septembro, senevite vizitu
 la urbon Vinkovci en koro
 de tiu regiono.



IMPRESOJ EL KROATIO

 Bardhyl Selimi

Kroatio estas amata de mi ekde infanaĝo, danke al la rakontoj de mia patrino. Ŝi diris al mi, ke mia patro Adem, albano el Kosovo, estis studinta en la universitato de Zagrebo dum la jaroj 1938-1943 pri agronomia inĝenierado.

Poste mi eksciis, ke la iama ŝtatrezidento de la eksa Jugoslavio Tito kaj same vico da ideologoj-gvidantoj devenis de tiu lando. Dum la lernejoj studoj, oni sciigis al ni, ke ĉe la kroata marbordo, nome apud Zadar (albane: Xara) kaj en Dubrovnik (Raguzo), ekzistis malnovaj albanaj kolonioj.

Post la jaro 1990 mi havis bonŝancon konatiĝi kun la libro de Spomenka Ŝtimec "La geografio de miaj memoroj" kie el la ok ĉapitroj unu estis dediĉita al Albanio.

La sendependiĝo de Respublikoj Kroatio kaj Slovenio sekvigis de sanguma milito fare de Serbio de Miloŝević kaj la preso kaj medio raportis sufiĉe multe kaj detale pri tio. Mi ne povas forgesi kio okazis en Vukavar kaj aliloke dum la milito en Kroatio.

En la jaro 1993 nia instruista sekcio estis akceptita kiel ILEI-sekcio kaj tion danke ankaŭ al granda subteno fare de kroatino Marija Beloŝević, tiam sekretario de ILEI. Estis ĝuste Marija kiu instigis nin sendi en Zagrebon grupon de gimnazianoj partoprenintaj la Esperanto-lernokurson en Tirano. Tiel somere de 1995 12 gelnantoj 17-jaraĝaj el gimnazio "Sami Frasheri" enŝipiĝis kaj vojaĝis al Rijeka kaj de tie buse al Zagrebo, kie ili gastis ĉe la albanoj loĝantaj en la kroata ĉefurbo. Samtempe ili estis akceptitaj de la lokaj esperantistoj kaj ekzamenitaj de la loka ILEI-komisiito.

Jaron poste mi bonŝancis viziti Kroation persone, kune kun kvinopo da knabinoj-esperantistinoj el Tirana tutnacia

hotelumada mezlernejo. La vojaĝo okazis same ŝipe de Dürres ĝis Split, sed ĝi longis du tagojn, ĉar unue ni devis atingi la italan marhavenon de Ancona.

Ni elŝipiĝis en la kroatian teron tagmeze. Estis bela varma vetero. Sur la marbordo, apud la busstacio, ni aŭdis paroli albane. Estis ja la etaj stratvendistoj kiuj probable venis tien el Kosovo antaŭ jaroj. Apude estis la ruinaĵoj de la antikva majesta palaco de la ilirdevena imperiestro Diokleciano.

Post iom da debatado kun la loka altstatura policisto kiu postulis de ni, kromalie, ke ni havu certan monon disponeblan, ni enbusiĝis kaj ekveturis al Zagrebo. Longa pluhora vojaĝo laŭbordo de la maro kaj parte tra montaro, elvolvis antaŭ niaj okuloj la kroatian naturon kaj belecon. Tio iel makuliĝis pro imagoj spektitaj dumvojaĝe tra la memproklamita eksa "Knina Serba Respubliko", kie la milito estis antaŭ nelonge finiĝinta. Tion rememorigis interalie ankaŭ la fumo eliĝanta de bruligitaj domaj kamentuboj. La kazo de Knin estis brila ekzemplo de la organizita volo de tuta popolo kroata ene kaj ekster Kroatio por konservi sian teritorian integrecon.

Al Zagrebo ni alvenis vespere. Ankaŭ tie atendis nin albanoj: s-ro- Ekrem Ymeri profesoro ĉe universitato, albano el Preŝevo, (regiono en suda Serbio, loĝata plimulte de albanoj). Ni gastis tiun nokton ĉe lia hejmo. Lia kroata edzino, inĝenierino, akceptis nin amece same kiel niaj sampatrujaninoj. Sammaniere akceptis nin ambaŭ knabinoj, el kiuj unu nomiĝis Teuta, ricevinte la nomon de la antikva ilira reĝino. Sed malfeliĉe la knabinoj ne parolis la albanan. Tio kutimas jam en multaj landoj kie ekzistas albana diasporo.

Tutan semajnon ni gastis ĉe aliaj albanoj loĝantaj



La tekstaŭtoro

kaj laborantaj en Zagrebo kaj Velika Gorica, simpatia urbeto apud la ĉefurbo. Albanoj en Kroatio sin okupas ĉefe per dolĉaĵejoj, panbakejoj, argentejoj, turismejoj. La albana komunumo en Kroatio tiutempe nombris 25.000 kaj ĝuis financan subtenon de la kroata registaro por aranĝi diversajn kulturajn aktivecojn. Dum niaj vizitoj la tutan tempon akompanis nin senlace fraŭlino Marija Beloŝević. Jaron poste Marija gastus ĉe mi en Tirano, kie ŝi malfermis ekspozicion kun pentraĵoj de kroataj infanoj, malfeliĉe dum la freneza monato marto de 1997, kiam la ŝtato ĉe ni portempe ĉesis ekzisti kaj la armiloj pafis senorde. Tiam mi sukcesis akompani ŝin ĝis la kroata ambasadejo de kiu ŝi iris al la stadiono kie atendis la fremdulojn itala milita helikoptero.

El multaj vizitoj en Zagrebo min pleje impresis tiuj de la prezidenta palaco, de zooparko en Maksimir, la universitata konstruaĵo, la Komerca Ĉambro (kie gastigis min aparte nia kara samideano Radenko Miloŝević), la maljunulejo ĉe la montetoj ktp.

Unu vesperon, kiam mi estis enbusiĝante por iri



LA STATUETO DE SPEGULO POR LA UNUA FOJO

✍ Tomasz Chmielik

Dum sia kunsido en Krakovo, okazinta la 10-an de majo, la redakcio decidis aljuĝi sian premion - la statuetojn de SPEGULO. Ni volas distingi tiujn, kiuj per diversaj klopodoj kaj honesta agado rimarkinde progresigas la internacian lingvon en la centra kaj orienta Eŭropo, kiuj en konkordo malbaras vojojn al novaj celoj kaj kun estimo kaj respekto servas al ĉiuj Esperantlingvanoj.

En la jaro 2008 ni decidis honorigi per la statuetoj de SPEGULO ĉi tiujn personojn:

1. Tadeusz CHROBAK

- post mortem - nia spirita gvidanto. Dum jaroj li batalis pri libereco de opinioj kaj kontraŭ ĉia desuprismo, en kiu li vidis efikan baron por lokaj iniciatoj. Granda malamiko de stulteco, diletanteco, moŝteco kaj ŝajna karieremo. Laŭ neforgeseblaj Tadeuszaj konsiloj ni plugos la propran sulkon.

2. Halina GORECKA - ni

admiras ŝian laboregon. De jaroj ĉe la flanko de sia fama edzo, Aleksandr Korĵenkov, ĉiam en ombro. Tamen ni estas certaj, ke post ĉiuj numeroj de unu el la plej gravaj informaj gazetoj, *La Ondo de Esperanto*, post ĉiuj volumoj aperintaj en la eldonejo *Sezonoj* staras ĝuste ŝi kaj horoj de ŝia komputora kaj redakta laboro. En Halina ni volas distingi ĉiujn edzinojn, sen kies pacienco kaj toleremo ne eblus sukcesoj de iliaj esperantistaj kunuloj.

3. Paweł JANOWCZYK - homo institucio,

animanto de *ARKONESOJ*, kiuj fariĝis unu el la plej gravaj kunvenoj de esperantistoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la mondo. Li efektivigis ion, kio ne sukcesas en aliaj lokoj - li kunigis ĉirkaŭ ĝi kaj ĉirkaŭ la Poznana aranĝo personojn el la juna

kaj maljuna generacioj, kiuj konkorde daŭrigas la dudekkkelkjaran tradicion.

4. Povilas JEGOROVAS - ni respektas

liajn organizajn talentojn kaj kapablon arigi helpopretajn sponsorojn kaj laboremajn samideanojn ĉirkaŭ aranĝoj kun monda signifo - ni

pensas pri la Universala Kongreso en Vilno (2005), kaj precipe pri la Ia Tutmonda Kongreso de Jurnalistoj-Esperantistoj, okazinta ĉi-jare en la sama loko dum la lasta semajno de majo. Admirindas kaj ravas la aktiveco de Litova Esperanto-Asocio sub lia gvido kaj nombro da libroj, kiujn sukcesis aperigi tiu ĉi organizaĵo dum la lastaj jaroj.

5. Josip PLEADIN - post

la formika laboro li kompilis kaj publikigis la epokfaran verkon *Ordeno de verda plumo* (2006), kiu estas la unua, tiel ampleksa leksikono pri Esperantlingvaj literaturistoj. En 2007 li komencis eldoni la novan revuon *Zagreba Esperantisto*, kies ĉefredaktoro li estas. La zagrebaj esperantistoj montras, ke en la lando kun malgranda, sed centjara Esperanto-movado oni povas aperigi informriĉan kaj belaspektan revuon.

Rimarkindas, ke ĉi tiu revuo estas sendependa kaj objektivite prezentas eventojn el la vivo de la kroataj kaj alilandaj samideanoj.

Ni esperas, ke la statuetoj de SPEGULO estos aljuĝataj ĉiujare kaj fariĝos simbola premio por diligenta laboro, serioza agado kaj servado al la Zamenhofaj ideoj.

Tomasz Chmielik, Kazimierz Leja,
Lidia Ligeza, Stanisław Smigielski



al Velika Gorica, mi vidis ŝurtrotuare s-inon Spomenka Štimec. Ŝi akompanis japanan samideaninon. Ĝuste pro ilia babilado en Esperanto mi divenis, ke ŝi povas esti mem Spomenka. Malfeliĉe, mi ne havis sufiĉe da tempo por babilu kun ŝi longe.

La duan viziton al Kroatio mi faris kune kun miaj kolegoj dum unu el niaj

ekskursoj eksterlanden. Tio okazis oktobre 2002. Ĉi foje ni restis tri tagojn en Dubrovnik, pri kiu mi revis delonge. Mi esploris tiun mezepokan unikan urbon konservitan sufiĉe bone, ne kredante al miaj okuloj, ĉu vere mi estas en urbo reala aŭ mia imago eniris profundan historion. Impresis nin ĉiujn la pureco, la akurateco kaj la ĝentileco de la lokaj civitanoj kaj servistoj,

inkluzive de ŝoforoj kaj vendistoj. Ni vizitis ankaŭ la plaĝon de Cavtat, miraklan ripozejon. Poste, danke al miaj rakontoj pozitivaj, ankaŭ miaj filoj loĝantaj en Italio somerumis kelkfoje sur la kroata marbordo, aparte en Dubrovnik.

Mi volonte revizitos Kroation por esplori ankaŭ aliajn vizitindaĵojn, inkluzive la amfiteatron en Pula kaj aliajn naturajn rezervejojn.

BOSNIA-HERCEGOVINA PROV-SUS DE AIS SAN-MARINO

✍ *Reinhard Fössmeier kaj Ljubiša Preradović*

Komence de septembro 2008 Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) okazigis provan SUS (SUS = Sanmarineca Universitata Sesio) en Bosnio kaj Hercegovino ("PSUS BA"), kiu pruvis la eblon tiulande aranĝi SUS-ojn. La sesio okazis en relative malgranda rondo, sed kun subteno de la loka universitato kaj sub la organizado de la loka AIS-profesoro Ljubiša Preradović. La studad-sesio estis malfermita dimanĉe, la 31-an de aŭgusto, en la festa salono de la banjaluka Akademio de la Artoj, en la rektoreja domo de la universitato. Dum la inaŭguro ĉeestis la ministro de komerco kaj turismo sinjoro mr Predrag Gluhaković.

En la stud-programo okazis kvar kursoj de po ok lecionoj, pri jenaj temoj: "Geografia informprilaborado" (OProf. Quednau), "Teknikoj kaj metodoj de mensa laboro kaj ergonomiaj mezuroj de fizikaj kaj de psikaj pen-elspezoj" (EProf. Mag. Lewanderska-Quednau), "Informadika modelado" (EProf. Preradović), "Bazaj principoj de la religia turismo (EProf. Leonov)

En la konferenca parto de la sesio okazis prelegoj de EProf. Sara Konnerth (RO), OProf. Eva Poláková (SK), Zlatko Hinšt dr. prof. (HR), ADoc. Dr. Macko (DE/HU), EProf. Dr. Preradović (BA) kaj Mićo Vrhovac inĝ (BA). La unua prelego devis okazi virtuale, tra reta video-prezentado, ĉar la preleganto ne povis persone alveni.

En la eksterkonferenca programo la SUS-anoj havis okazon ekkoni la urbon, kaj estis gastoj en Klubo de Etnaj Minoritatoj, en Esperanto-klubo

"La mondo", kaj la ministro Predrag Gluhaković preparis specialan akcepton de dekanoj kaj senatano. Oni proponis organizi internacian festivalon kune kun scienca konferenco. La jaŭda posttagmezo estis rezervita por ekkoni la ĉirkaŭaĵon de Banjaluko ekskursante laŭ rivero Vrbas al Krupa na Vrbasu, urbeto kun mezepokaj urbokerno kaj monaĥejo.

Ankaŭ okazis kunsidoj de unuopaj sekcioj kaj landa

asocio (AIS-DE).

Fine de la sesio du kandidatoj defendis en publikaj ekzamenoj la rezultojn de sia studado: Ili sukcese magistriĝis respektive doktoriĝis en la sekcioj morfo-scienca kaj hom-scienca.

La Ĝenerala Asembleo de AIS esprimis la deziron, en 2009 okazigi SUS-on en Bjalistoko, dum kaj post la 94-a Universala Kongreso de Esperanto. La ebleco tiel kunigi AIS-IKU kaj SUS tamen ankoraŭ ne estas certigita. Ĝenerala deziro estis reveni al Banjaluko por plia AIS-sesio.

Malsupraj fotoj montras la gajan societon de la partoprenintoj de la prov-SUS de AIS en Banja Luka



SCIENCA LIBRO PER ESPERANTO



Ljubiša Preradović

La libro enhavas 287 paĝojn kaj estas dividita en kvar partojn. La unuan parton (Komenco de civilizacio) verkis prof. dr Anatolij Sheypak, profesoro ĉe Moskva ŝtata industria universitato (Moskvo, Rusio), dum la aŭtoro de la dua parto (Historio de matematiko) estas prof. dr Carlo Minnaja, profesoro ĉe Universitato de Padova (Italio). La tria parto (Retrospektivekspono en historia evoluo de telekomunikiloj) estis verkita prof. dr Demal Kolonić, profesoro ĉe Universitato en Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), kaj la kvaran parton (Retrospektivekspono en historia evoluo de komputiloj) verkis doc. dr Ljubiša Preradović, docento ĉe Universitato en Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino). La unuaj du partoj estas originale verkitaj en Esperanto. Tradukojn faris sinjoroj Dimitrije Janičić el Beogrado (Serbio) kaj Boriša Milićević el Novi Sad (Serbio). La recenzantoj estas prof. dr Dušan Drajić (Elektroteknika fakultato, Beogrado), prof. dr Krstan Bošnjak (Elektroteknika fakultato, Banja Luka) kaj prof. dr Perica Gojković (Trafika fakultato, Doboj, Bosnio kaj Hercegovino). Kuneldonis la libron Trafika fakultato el Doboj kaj Asocio Internacia de Scienculoj el Banja Luka en eldonkvonto de 300 ekzempleroj. La unua, tria kaj kvara aŭtoroj estas profesoroj ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kaj ilia kunlaboro komenciĝis en universitata sesio en pitoreska Respubliko San Marino en la centra parto de Apenina duoninsulo.

REKLAMSTANDO EN LA BIENO “ZRNO”

La 28-an de septembro, kroataj esperantistoj vizitis la bienon “Zrno” (=Grajno) de samideanino Zlata Nanić en la vilaĝo Habijanovac, kiu okupiĝas pri ekologia produktado de fruktoj kaj legomoj. La bieno por la 6-a fojo gastigis aranĝon “Festotago de terfruktoj”, kiu okazis sub aŭspicio de Ministerio de agrikulturo, Kroata instituto por konsilservo, Zagreba distrikto kaj komunumo Dubrava (apud Vrbovec). La programo konsistis el ekologia kaj kultura partoj. Okazis diversaj laborejoj pri kuirado kaj ekologia produktado, fungokolektado ktp. En la kultura parto okazis folklorajoj, pupprezentaĵoj kaj dancoj. Por esperantistoj aparte simpatia estis la programo de juna esperantistoj kiuj kantis kaj dancis en Esperanto sub la gvido de sia instruistino Silvija Fostač. Inter multaj diversaj standoj kiuj vendis naturajn kaj ekologiajn produktojn, troviĝis ankaŭ la stando “Esperanto”, kiun komune organizis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto kaj Esperanto-societo Rijeka. La stando elvokis grandan intereson de la ĉeestintoj, el inter kiuj pluraj deklaris, ke ili iam lernis Esperanton en diversaj urboj de Kroatio. Esperanton al neesperantistoj tie kolektiĝintaj prezentis la bienestrino Zlata Nanić kaj vicprezidanto de UZE Josip Pleadin.



Kvina ĉapitro PRI LA KOITO

Sciu, ho veziro (gardu vin la granda Alaho!), se vi deziras koiti kun virino, ke vi ne rajtas ŝin alpaŝi plenventre, ŝarĝite per manĝaĵo kaj trinkaĵo, ĉar via koito ne estos agrabla, nek ĝi estos bona por la sano. Se vi aliras ŝin kun plena stomako, tio malutilos kaj al vi kaj al ŝi. Baldaŭ vi rimarkos sur vi signojn, kiuj anoncas koratakon aŭ ostodoloron, sed la minimuma malbono, vi ŝin povas trafi, estas urinaj malfacilaĵoj kaj malfortigo de vido.

Klopotu do, ke via stomako neniam estu ŝtopegita per manĝaĵo kaj trinkaĵo kiam vi proksimiĝas al virino, kaj se vi obeas ĉi tiun mian konsilon, neniam malsanon vi devas timi.

Kaj antaŭ ol vi komencas geiĝi kun virino, ekscitu ŝin per ama antaŭludo, por ke la koito por vi ambaŭ finiĝu plenkontente.

Tial vi bone faras, se vi iom ludas kun ŝi antaŭ ol meti vian seksumilon en ŝin kaj tute kuniĝi kun ŝi. Kaj ŝin vi povas eksciti kisante ŝiajn vangojn, suĉante ŝiajn lipojn kaj mordetante ŝiajn mamojn. Kaj kisu ŝian umbilikon kaj la lumbon, kaj milde karesu ŝin laŭ la femuroj. Mordetu ŝiajn muskolojn sur la brakoj, kaj nenium parton de ŝia korpo neglektu. Fine alpremetu vin al ŝia brusto, kaj tiel esprimu al ŝi vian amon kaj sindonemon, kaj ĉirkaŭprenu ŝiajn krurojn per la viaj, kaj firme tenu ŝin en la sino, ĉar iu poeto diras:

Mia dekstra mano kusene sub la nuko estis, kaj por ŝin al mi altiri, la maldekstran mi etendis, kaj ŝi apogis sin sur ĝi kiel sur lito.

Kaj se vi tiel tute proksimiĝis kaj alpremiĝis al ŝi, kaj vi vidas, ke ŝia rigardo nebuliĝas, kaj vi aŭdas ke ŝi profunde ekspiras sopirante

EL “LA ODORA ĜARDENO DE ŜEJKO NEFZAVI”

al la geiĝo, lasu ke via kaj ŝia pasio kunfandiĝu, kaj tiam via deziro kulminu, ĉar tio estas la vera momento de la komenco de amorludo. Se vi tiam senhezite trovas la vojon en ŝin, vi sendube havigos al ŝi la plej grandan plezuron. Vi sentos, kiel la lipoj de ŝia seksumilo ensuĉas vian seksumilon, kaj tio donas al vi kaj ŝi la plej grandan ĝojon, ĉar tio provokas kaj pravas la reciprokajn simpatiajn kaj amon pli ol io ajn.

Kaj konate estas, kiond iris iu bonega konanto de la ama arto pri la virino:

“La virino similas al frukto, kiu ne donas sian dolĉon dum vi ne frotas ĝin bone per viaj manoj. Ekpensu nur pri la ocimo. Se vi ne varmigas ĝin bone kaj ne disfrotas ĝin inter la fingroj, ĝi vastigos nenian odoron. Ĉu vi ne scias, ke la ambro retenas sian odoron en siaj poroj ĝis vi prenas ĝin en la manojn kaj varmigas ĝin? Same estas ankaŭ kun la virino. Se vi ne ekscitas ŝin per ludo, kaj ne superŝutas ŝin per kisoj, mordetoj kaj karesoj, neniam vi ricevos de ŝi kion vi deziras. Vi ne ĝuos la koiton kun ŝi, nek vi plaĉos al ŝi, nek vi stimulos ŝian simpatiajn kaj ankoraŭ malpli vi ricevos ŝian amon. Ĉiuj ŝiaj karakteroj kaj virtoj restos por vi kaŝitaj.”

Oni rakontas, ke iu viro demandis virinon, kiamaniere oni povas stimuli la amon kaj deziron pri kuniĝo en la koro de virino, kaj ŝi respondi al li:

“Vi demandas min, kio stimulas la sopiregon de virino je la kuniĝo? Prefere min demandu, kiaj devas esti la interbrakumo kaj kisado kiuj ĝin antaŭas, kaj la interpretado en la sino en la momento de l ejakulo!

Kredu al mi, la kisoj, mordetoj, la eltrinko kaj suĉado de la lipoj, la tuŝtado de l manpintoj, tiuj estas tio, kio la

simpatiajn de virino igas daŭra!

Ĉe tiaj amorludoj la viro kaj virino atingas la kulminon de ĝuo kaj delico en la sama momento, kaj la sino de virino firme ĉirkaŭprenas la viran organon, kio al ili ambaŭ kaŭzas la plej grandan ĝojon.

Sciu, ke ĝi estas tio, kio vekas la amon de virino, kaj se ŝi ne estas tiel preparita, ŝi ne travivos la plenan ĝuon en la koito, kaj ŝia sino ne sentos la kompletan kontentigon de siaj deziroj, kaj la virino neniam sentos amon al rajdanto nekapabla ekflamigi kaj estingi la flamon en ŝia sino. Sed se ŝia sino ekflamsopiras al la geiĝo kaj ŝi fariĝas partoprenanto en la amorludo, ŝi sentos ardan amon al li, kiel ajn neŝatata estus lia eksteraja.

Tial faru ĉion, kion vi kapablas, ke vi ambaŭ sammomente sentu la plezuregon de volupto. En tio kuŝas la tuta sekreto de l amoro.”

Jen kiel parolis la virino al la viro kiu ŝin demndis, kaj Alaho estas mia atestanto, ke ŝi bone respondis.

Kaj iu saĝulo, kiu sian tutan vivon dediĉis al la studado de l ama arto, ĉi tiel transdonas la konsilojn konfiditajn de alia saĝulo, ankoraŭ pli granda sciulo en la aferoj koncernantaj la amon:

“Viro, kiu volas konkuri la amon kaj simpatiajn de virino - kaj ĉi tio koncernas ĉiujn virojn senescepte, kia ajn estu ilia eksteraja - kaj kiu deziras, ke ŝiaj sentoj kaj simpatio al li estu kaj restu daŭraj, devas dediĉi multon da vervo al la amora antaŭludo, kaj tiel devas prepari la virinon al la geiĝo, kaj rajtas nenion neglekti, kio kunhelpas ŝian ĝuadon.

Kaj tial mi diras al vi, viroj, estu atentemaj al la virino,

MOGILA – LA OMAĜTUMULO OKAZE DE LA MILJARIĜO DE LA KROATA REGNO

Ekzistas multaj simboloj kaj monumentoj karaj al popolaj koro kaj memoro. Laŭ ideoj de la zagreba episkopo Maksimilijan Vrhovec, estis konstruita kaj en 1839 malfermita la zagreba park-arbaro Maksimir. Okaze de la miljariĝo de la kroata regno, en 1925 en Maksimir estis starigita omaĝtumulo “Mogila” (=tombmonteto), per kiu estis signita la jaro 925, en kiu la kroata duko Tomislav estis kronita por kroata reĝo. La vorto “mogila” devenas el la rusa kaj praslava lingvoj kaj signifas tombon, monteton aŭ aglomerajon. “Mogila” estis projektita de la arkitekto Aleksandar Freudenreich kaj konstruis kaj starigis ĝin Hrvatski sokolski savez (= Kroata Sokola unuiĝo; kroata sporta organizaĵo). La omaĝtumulo estis konstruita el terbuloj prenitaj el 155 lokoj de diversaj kroataj regionoj, aparte historie kaj kulture signifaj en la miljara kroata historio. En la fundamento de la monteto estis deponitaj diversaj kroataj kulturaj heredaĵoj, libroj, revuoj, ĵurnaloj kaj emblemoj de ĉiuj sokolaj societoj partoprenintaj la solenan inaŭguron la 15-an de aŭgusto 1925.

Dum la solena inaŭguro estis vicigitaj ĉirkaŭ la duonfinita monteto unuopaj societoj kun la saketoj da tero en la manoj. La teruletoj estis verŝitaj sur la monteton kaj la ceremonio estis akompanita per fanfarsonoj kaj per naciaj vekkan-



Radenko Milošević

toj. La lasta saketo da tero estis tiu de la monaĥestro el Knin, kiu diris jenajn vortojn: “Mi metas bulon de sankta tero kiu naskis la unuan kaj la lastan kroatan reĝojn.”

Ĉirkaŭ la monteto estis plantitaj dek tilioj simbolantaj la dek jarcentojn de la kroata regno. Al ĝia ŝtona pinto gvidas mallarĝa ŝtuparo kaj super la pintan postamenton devis esti metita bronza falko, verko de la skulptisto Ivan Kerdić. La skulptaĵo, tiam barbare disrompita, estis restaŭrita apenaŭ en la jaro 1994, kiam “Mogila” estis riparita dank’ al la unuiĝo “Braća hrvatskog zmaja”. Terbulon al la tumulo aldonis, kaj per sia kiso benis ankaŭ la papo Johano Paŭlo la Dua. La falka skulptaĵo estis metita en la planitan lokon la 28-an de majo 1995.

kaj atentu ĉiun signon, kiun ŝi donas, okupiĝu nur pri ŝi, kaj ne permesu ke io ajn deturnu viajn pensojn pri ŝi.

Kaj aparte atentu pri tio, ke vi ne preterlasu la ĝustan momenton. Sciu, ke tiu momento venas tiam, kiam la okuloj de l virino fariĝas malseketaj kaj la palpebroj duone fermiĝas. Kiam vi vidas, ke alvenis tiu momento, kaj ke viaj kisoj, flatoj kaj karesado havas sian efikon, komencu la laboron.

Obeu mian konsilon, viroj, kaj nur tiel ekscitinte la virinon kaj fajriginte ŝian deziron, metu vian seksumilon en ŝian seksumilon. kaj se viaj movoj estos regulaj, la virino certe sentos la aspiritan kaj kvietigos sian volupton. Kaj dum vi kuŝas sur ŝia brusto, superŝutu ŝiajn

vangojn per kispluvoj.

Se Alaho lasas al vi atingi la paradizajn delicojn, ne eltiru tuj vian membron el la virino, sed lasu ĝin ene, kaj ĝuu la delicojn kiuj longe daŭros. Kaj aŭskultu la suspirojn kaj la ekscitan spiradon de la virino, ĉar ili estas la pruvoj de l senfina plezurego, kiun vi donis al ŝi.

Kaj kiam la ĝuado pasis, kaj finiĝis la amora luktado, ne forpuŝu vin simple disde la virino, sed malrapide retiriĝu. Restu apud ŝi, kuŝiĝu sur la dekstran flankon de l kuŝejo, kiu estis atentanto de viaj plezuregoj. Al vi estos agrable apud ŝi; kial vi kondukus kiel krudulo, kiu traktas la virinon kvazaŭ ŝi estus mulo kaj suprengrimpas sur ŝin malatentante la bonajn kutimojn

kaj ejakulinte, tuj formoviĝas, ekstaras kaj foriras? Neniam konduku tiel, vi senigos la virinon je la daŭra ĝojo, kaj vi rifuzos de vi ŝian amon kaj simpation.”

Tiel konsilis la virojn tiu saĝulo, kiu sian scion kompletigis per la scio de alia saĝulo, kaj bone li konsilis ilin. Ĉar vera sindonemulo de la ama ĝuado neniam neglektos eĉ unu el tiuj konsiloj, kies celo estas instrui: kiel li donos la plej grandan plezuron dum la geiĝo. Kaj en ili estas dirita ĉio, kion oni devas malneglekti.

Alaho vartas nin ĉiujn, kaj ĉion li faris tiel, kiel estas plej bone! Li estas mia garantianto, ke ĉio estas kiel mi diris.

Tradukis: Csaba Finta

HOMO KUN PLURAJ "METIOJ"

  **Davor Grgat**

"Jen, mi enpaŝis en la 83-an vivojaron, kaj en mia vivo gravis tri aktivecoj. Egale bone mi estas konat akiel olivkulturisto, montgrimpano kaj esperantisto" - tiel parolas nia kunparolanto Ivo Piharić el Makarska, kiun ni petis, speciale por "Zagreba Esperantisto" rakonti sian historion, kiun la legantoj certe volonte tralegos. "Mi okupiĝis ankaŭ pri aliaj temoj, sed menciidas, ke mian personan taglibron mi notas jam plenajn 60 jarojn. En ĝi estas diversaj aferoj. Sed mi parolu laŭ kronologia ordo. En la jaroj 1949 kaj 1950, kiam mi laboris en Split, sed ankaŭ pli frue laborinte en Bjelovar, mi aŭdis pri Esperanto. Post kiam mi revenis labori en Grenfonduso en Split, unu jaron poste, mi ekinteresiĝis por Esperanto-kurso gvidita de elstaraj esperantistoj Ante Vesanović kaj Aleksa Hrستیć. Reveninte al Makarska en 1953, kun la malnova esperantisto profesoro Bašica, mi kolektis tridekon da gejunuloj por organizi dumonatan kurson de Esperanto. Kun nostalgio mi rememoras la subtenon kaj helpon de la aŭtoritatoj de Makarska, kiuj en 1953 helpis al mi partopreni la plej gravan tiujaran eventon - la 38-an Universalan Kongreson de Esperanto en Zagrebo. Tiu kongreso al mi "malfermis la okulojn" kaj ekd tiam direktis min aktivi por diskonigo de la Internacia Lingvo. Kiel juna esperantisto mi multe korespondis. Poste mi partoprenis gravajn renkontiĝojn de esperantistoj, ekz. la 3-an Kulturfestivalon de jugoslavaj esperantistoj en 1960 en Split, la 58-an Universalan Kognresond e Esperanto en Beogrado (1973), la 22-an landan kongreson en Banja Luka en 1987, la 72-an UK-on en Varsovio, la 3-an konferencon



laborema edzino, ĉar, kvankam ni estas maljunaj, ankoraŭ ni tre aktivis, kaj olivoleo ne mankas por nia uzo, eĉ ni vendas ĝin. Mi ankaŭ verkis poemon pri olivoj "Al la oliva frateco de Mediteraneo - odo al olivoj", kiu estis publikigita en Madrido ĉe la Internacia Asocio de olivkulturistoj, kaj presita en kvin lingvoj" - diris al ni la sinjoro Puharić. Kaj ni demandas nin, kial la poemo ĝis nun ne aperis ankaŭ en Esperanto, kaj ni promesis nian helpon por fari tion.

de balkanlandaj esperantistoj en Ohrid, la 86-an UK-on en Zagrebo en 2001, la 88-an en Gotenburgo en 2003 kaj la 90-an en ilno en 2005."

Ni atentigas lin pri la kuriozaĵo, pri kiu li ŝerce aldonas: "Jes, la kuriozaĵo estas, ke siatempe mi estis la sola parolanto de Esperanto en la mondo kiu samtempe estis olivkulturisto. Cetere, kontrolu la Jarlibron de UEA el antaŭaj jaroj. Kiam iu svedo legis, ke ankaŭ inter esperantistoj ekzistas olivkulturisto, li skribis al mi, ke tiu temo estas al li interesa, kaj ke li volus veni al Makarska por interparoli kun mi. Nelonge poste ni renkontiĝis. Li venis kun sia edzino, kaj veninte en la olivarbejon, li genuis sub olivarbo mirante la abundan fruktokvanton. En la eksa Jugoslavio kaj en la mediteraneajlandoj mi estas konata kiel olivkulturisto, ĉar mi heredis tiun okupon de miaj patro kaj avo. Multe mi aktivis en tiu branĉo, estinte prezidanto de Asocio de olivkulturistoj de iama Jugoslavio. Mi partoprenis mondajn kunvenojn de olivkulturistoj en pluraj mediteraneaj landoj. Sed mi aldonas, ke la rezultoj venis nur kun granda apogo de mia



Demandita pri la stato de la Esperanto-movado en la regiono de Makarska, la samideano Puharić respondis: "Bedaŭrinde, ni ne povas paroli pri grandaj sukcesoj, kvankam oriente de Split la situacio estas iomete pli favora, dank/ al la obstina laboro de Davor Grgat, kiu eĉ la veturantojn en la Adriatika magistralo proksime de Dugi Rat atentigas pri Esperanto per granda reklampanelo. En Ploče pri Esperanto dum jaroj aktivis profesoro Ivan Tomašević, instruinta Esperanton en 1957/58 en Metiista lernejo, kie li estis instruisto. Profesoro Tomašević, samkiel mltag maristoj en la Militŝiparo finis kurson de Esperanto gviditan de Davor Grgat, post kio en Ploče li fondis Esperanto-grupon "Maristo". La profesoro Tomašević bone lernis Esperanton, kaj en siaj maljunaj jaroj antaŭdorme li legis interesajn legaĵojn en Esperanto. Li forpasis en 2002."

Ni demandis nian kunparolanton ankaŭ pri lia okupiĝo pri montgrimpado. Post eta paŭzo li respondis: "Mi naskiĝis en la piedo de la monto Biokovo, en malnova setlejo Puharići, precize 500 metrojn for de la unuaj shtonblokoj kaj la unuaj klifoj. Kun mia patrino la unuan fojon mi grimpis al Biokovo, kun azeno en la jaro 1940, kiam mi estis 15-jara, kaj en la terparcelo nomata Dolac, tiam ni semis terpomojn. Venis milita tempo. Kiel infano, mi aktivis en junularaj rondoj, sed la monton Biokovo mi trakrozis diversdirekte. En 1974 estis fondita Montgrimpa seceito "Biokovo" al kiu mi tuj aliĝis, kaj dum pluraj jaroj mi estis ĝia prezidanto. Konante la monton Biokovo, mi markis la 110-kilometran biokovan montaran vojon de Ploče al Zaveterje (Gornja Brela). Kiel ŝatanto de montgrimpado, mi grimpis ankaŭ al aliaj montopintoj. Mi grimpis al ĉiuj kroataj montoj, sed ankaŭ al Rila en Bulgario (1925 m), Grand Saso en Italio ktp."

Ivo antaŭ mutlaj jaroj finis ankaŭ kurson por gardanto de la montara naturo, kaj dum longa tempo li estis ankaŭ gvidanto tra Biokovo.

Je mia demando pri lia kronikista laboro en la riviero de Makarska, li ridante respondis: "Jes. Dum plenaj 40 jaroj mi estis kronikisto de la antaŭa semajna gazeto "La Riviero de Makarska", de antaŭ nelonge nomiganta "La Marbordo de Makarska", en kiu mi verkis pri travivaĵoj, impresoj kaj komentoj el multaj vojaĝoj, pri spertoj en montgrimpado, olivkulturado, kaj kompreneble, ankaŭ pri renkontiĝoj kun esperantistoj. Kiel maŭfta kronikisto mi notis ankaŭ la veterprognozon. Unuvorte, en mia riĉa arkivo, mutlaj aferoj troveblas".

MONTMIGRANTE EN SLOVENIO

  Vanja Radovanović



Ĉi-jare okazis la 19-a MKR (MontKabana Renkontiĝo), tradicia aranĝo por esperantistoj-montmigremuloj, kiu ĉi-foje denove estis gastigita en Slovenio. La MKR-ejo estis la Montkabano Uskovnica, kiu troviĝas ĉirkaŭ 10 km for de la lago Bohinj, sur la samnoma Uskovnica altebenaĵo, kune kun pluraj paŝtistaj domoj kiuj nuntempe servas kiel feridomoj. La aranĝon partoprenis 25 partoprenantoj el 8 landoj, inter kiuj estis eĉ unu partopreninto el Ĉinio.

Kiel kutime, la ĉefa programo de la aranĝo estas montmigradoj: spertaj montmigrantoj vizitis pintojn *Mali Draški Vrh* kaj *Tosc* (2243 m) kaj la aliaj vizitis *Planina Konjščica* (1438 m) kaj la akvofalon *Mostniški slap* en la valetoj *Voje*. La vetero ne estis tre agrabla - kvankam ne pluvus, la ĉielo estis ĉefe nuba kaj la ekskursantojn ĝenis foje tre forta vento. Sur la plej altaj pintoj troviĝis ankaŭ iom da neĝo kaj multe da glacio kiu kolektiĝis tie pro la malaltaj temperaturoj - do, la kondiĉoj estis tute vintraj.

Krom pri la ekskursoj, la partoprenantoj okupiĝis ankaŭ per diversaj ludoj, la infanoj (estis 5 entute) precipe ludis per aŭtetoj, lignaj ludiloj, aŭ desegnigis. Aldone, estis amuze vidi plurajn ĉevalojn kiuj foje ĉirkaŭris la kabanon, kaj foje ili eĉ eniris la ĝardenon de la MKR-ejo!


La aranĝo finiĝis per dimanĉa promenado kaj fina tagmanĝo en vilaĝa gastejo en *Srednja Vas*. Dum la tagmanĝo finfine la suno montriĝis kaj ni forlasis la aranĝon pensante: "Gxuste nun estus bona momento por fari novajn ekskursojn!" ... sed, la aranĝo jam estis for, kaj ni revidos unu la alian en la jaro 2009, en Kroatio, plej verŝajne en *Starigrad-Paklenica*!

KROATA-NOVZELANDA ESPERANTISTO ŠIMUN MIJO UJDUR

✍ *Josip Pleadin*

Al galerio de nekonataj samideanoj nemenciitaj en "Biografia leksikono de kroataj esperantistoj" (2002), certe aldonendas *Mijo Ŝimun Ujdur*.

Tiu escepta homo naskiĝis en Gradac (tiutempe en Aŭstri-Hungario) la 10-an de januaro 1881. Li enmigris Novzelandon en 1895 kiel 14-jarulo, en unu el la plej fruaj grupoj de kroataj enmigrintoj. Tie li laboris kvin jarojn kiel fosanto de kaŭria peĉo, post kio, verŝajne sub premo de aŭstria konsulejo, kiu invitis lin soldatservi, li vojaĝis tra Usono al sia patrolando. En Usono li provis trovi laboron kaj eskapi, sed, ĉar temis pri tempo de ekonomia malkresko, ne trovinte laboron, li tamen revenis al sia patrujo, kaj poste dum tri jaroj militservis en la aŭstria militŝiparo. Dum la militservo li lernis la italan kaj germanan lingvojn, kaj spertiĝis pri fotografado. Pro ekonomiaj kaj politikaj kialoj li denove elmigris al Novzelando en 1903 kiel 22-jarulo, denove fosis la kaŭrian peĉon, sed li baldaŭ komprenis, ke ekzistas pli kvalitaj laboroj. Unuamomente li (kun)fondis fotografian atelieron kun la samlandano Mate Kuluz en Dargaville kaj inter 1904-1920 li vojaĝis kaj fotis tra la lando. En 1911, kolektinte sufiĉan monsumon, li aĉetis grundon kiun li nomis Birdwood kaj tie



li havis la unuan rikolton en 1915. Poste li serĉis eblecon aĉeti pli da grundo, kion li sukcesis en la kruciĝo de Birdwood kaj Glen St. kaj registris ĝin en New Lyn sub la nomo M. Hunter, ĉar kiel aŭstria civitano en la tempo de la unua mondmilito, li ne rajtis aĉetadi grundon. Dum la unua mondmilito li politike aktivis kiel prezidanto de la novzelandana branĉo de Yugoslav Committee en Londono. Kun tempofluo, li transprenis la nomon Simon Mitchell Ujdur kaj fariĝis unu el la plej grandaj novzelandaj vinberkulturistoj kaj vinproduktantoj, kaj en la periodo 1926-1946 li estis prezidanto de Vinberkulturista asocio de Novzelando.

Ekde 1904 ĝis sia morto li estis aktiva esperantisto, komence en Dargaville. Tiu jaro estas la jaro en kiu fondiĝis la novzelandana movado, kaj li verŝajne mem partopreninte la fondkunvenon de la landa asocio. En 1911 li estis delegito en la unua landa Esperanto-kongreso okazinta en Auckland.

Krom kiel fotisto, esperantisto kaj vinberkulturisto, li aktivis ankaŭ kiel masono. Li posedis unu el la plej grandaj bibliotekoj en tiu mondoparto, kiu nombris 36.000 librojn en la angla, germana, itala kaj Esperanto, kiujn li egale bone parolis.

Pro anonima letero al Customs Department, ke li vendas kontraŭleĝe alkoholaĵojn, li ricevis dujaran malpermeson produkti kaj vendi vinon, kio estis komenco de lia pereco.

Ĉe la fino de la dua mondmilito, li skribis al sia frato Georg, troviĝanta en la egipta rifuĝtendaro El Shatt, petante lin veni al Novzelando kaj helpi al li gvidi la vinproduktadon. La frato kaj lia filo Šimun alvenis en 1946, sed malfrue por savi la bienon Birdwood Vineyards kiu jam estis antaŭ bankroto. Komplete rompita, Šimun Mijo Ujdur mortis je Kristnasko de 1953, kaj lia havaĵo estis malmultekoste disvendita.

LUDOVIKUKETOJ

✍ *Peter Weide*

La dolĉajbakisto *Hermann Kroppenber*, kiu gvidas kafejon kaj vendejon en la proksimeco de Kolonjo en Germanujo kaj tie vendas siajn altkvalitajn produktojn, nun povas liveri interesan novaĵon: la *Ludovikuketojn*. Temas pri tavolotoj, kiuj estas 4 cm larĝaj kaj 6 cm longaj. Ili estas faritaj el unuaklasa marcipano kaj kovritaj per ĉokolado kun 72% da kakao. La Ludovikuketoj estas haveblaj en du eldonoj: Unu montras reliefon de Zamenhof, ankaŭ farita el marcipano, la tavolo pezas entute proksimume 35 gramojn.

La alia montras bildon, kiu estas presita sur sukerfolion per nutrajdevenaj inkoj. Ĝi pezas proksimume 25 gramojn. ATENTU: Vi povas mem decidi, kiun bildon kaj tekston vi deziras havi sur la kuketo! Per tio ĝi estas adaptebla al ĉiu ebla okazaĵo kaj celo: Zamenhoffesto, vojaĝo, renkontiĝo, ekspozicio ktp. La kuketoj estos produktataj freŝe post via mendo, ili restos freŝaj dum du monatoj. (Post tiu tempo ili restas manĝeblaj ankoraŭ, sed iom sekigos.) La prezo por unu kuketo estas proksimume 1,50 eŭroj, depende de la afranko (stato de aŭtuno 2008). La prezo nur kovros la produktokostojn. Hermann ne volas gajni per la Ludovikuketoj, sed deziras per tiu ĉi oferto subteni Esperanton kaj la informadon pri la lingvo. La minimuma mendokvanto estas 50 pecoj. Por pli precizaj informoj kontaktu Hermann Kroppenber: ck@cafe-kroppenberg.de. La kuketoj la unan fojon estis vendita dum ekspozicio-tago en Kopenhago en Danlando.



GVOZDANSKO

KROATA
FORGESITA
HEROECO

*Sieĝo de Gvozdansko
ekde la 3-a de oktobro
1577*

✍ Radenko Milošević

Ĉiam ekzistis grandaj kaj malpli grandaj bataloj, militoj, sieĝoj kaj bravecoj kun siaj herooj. Iuj protagonistoj ĝisvivis laŭdon kaj aplaŭdon. Iuj fariĝis mondfamaj kaj aliaj estis forgesitaj eĉ en siaj propraj popolo kaj lando. Tiel okazis pri la herooa defendo de la fortikaĵo Gvozdansko, kiu rapidege malaperis en turbulada kroata historio. Nur la kroata politikisto kaj vekisto Ante Tresić Pavičić skribis en la plej granda eposo "Gvozdansko" pri "la plej kavalira, brava kaj nekredibla evento en la historio de la homaro", kiu estis finita en la jaro 1940 kaj publikigita apenaŭ en 2000. Pri la defendo de **Siget** (hungare: Sziget), fortikaĵo en Hungario oni jam scias, ke tie en la jaro 1556 heroe pereis ĉiuj defendintoj gviditaj de la iama legenda banuso Nikola Zrinski. Eble oni aŭdis pri tiu pereco eĉ eŭrope. Speciale tial, ĉar la historia evento fariĝis konata pro la fama opero "Batalo de Siget" de la nobela Ivan Zajc.

Popoloj zorgas pri siajn bataloj kaj iliaj herooj, kiuj ofte eniris kiel elstaruloj la ĝeneralan mondan historion. En la monda milithistorio estas aparte konataj bataloj, defendoj kaj pereoj de defendintoj post longaj herooĵoj. Multaj aŭdis la nomon de la hebrea fortikaĵo **Masado** (sur la okcidenta bordo de la Morta maro), kiun detruis romianoj en la jaro 73 p. K. Konatas la nomoj de la hispana **Alcazar** aŭ la teksasa **Alamo**. Ili estas konataj sinonimoj pro la plej grandaj militistaj kuraĝoj, konscia sinofero kaj herooa rezisto ĝis la lasta homo por propra hejmlando.

En la 16-a jarcento kroatoj permanente batalis kontraŭ turkoj, kaj tiam Kroatio ŝrumpis al la t.n. "restaĵo de la restoj de iam gloriplena Kroata reĝlando". La fortikaĵo **Gvozdansko**, maljuste forgesita, situis apud la urbeto Dvor ĉe la rivero Una, sur la monteto, kie ankoraŭ kuŝas ĝiaj ruinoj. Laŭ la dokumentoj el 1488 oni scias, ke ĝi apartenis

al la elstara familio Zrinski, origine nomata Ŝubić. Apud la citadelo tiam troviĝis arĝentminejoj. En la fortikaĵo, estinte tiam tre signifoplena defendreduto, estis ĉiam lokita forta garnizono. Tiam papo nomis ĝin "antaŭmuro de kristanismo" ("Antemurale Christianitatis").

La sieĝo de Gvozdansko komenciĝis la 3-an de oktobro 1577, kiam turkoj blokis ĉiujn direktojn per kiuj povis veni ia ajn helpo al la ĉirkaŭita fortikaĵo de Gvozdansko. La unua falis la apuda citadelo de Zrin la 10-an de oktobro. Post trimonata blokado, la garnizono en Gvozdansko restis sen plej granda parto de sia nutraj- kaj hejtaj-provizo. La defendintoj rifuzis malgraŭ ĉio la ofertojn kapitulaci, interalie ankaŭ tiun senditan dum Krisnasko de 1577. Kanonatakoj de turkoj estis ĉiam pli fortaj, sed dekumitaj kaj malsataj defendantoj rifuzis la turkajn ulimatojn. Venis la 9-a de januaro 1578 kiam tute malplenis la nutrajprovizejo. Per malesperaj kaj superhomaj fortoj, elĉerpita pro malsato kaj malvarmo, la garnizono plue defendis la fortikaĵon kontraŭ ĉiuj atakoj. Post nekredibla batalego, turkoj post longa kanonpafado finatakis la 13-an de januaro la lastajn tridek defendintojn restintaj preskaŭ sen municio.

Dum tiu nokto estingiĝis ĉiuj fajroj en la urbo-citadelo. La turkoj venintaj al la muroj atendis pafadon, sed eĉ ne unu pafilo sin anoncis. Sen rezisto ili eniris tra la pordego de la fortikaĵo, raj haltis surprizitaj pro la terurega vidaĵo. En la urbo, inter la ruinoj, ili trovis nur mortajn korpojn. Ĉiuj defendantoj kuŝis ĉe siaj defendlokoj, mortaj kaj frostiĝinaj, dum en la fortikaĵo troveblis nenia nutraĵo, akvo, municio aŭ hejtajo.

La turka bejo konsterniĝinta pro la vidita sceno kaj ekscitita pro la braveco de la garnizono, estiminta ilian heroecon, ordonis, ke oni venigu katolikan pastron, por ke oni per kristiana ceremonio entombigu la falintajn defendintojn.

IVANA BRLIĆ MAŽURANIĆ

 Radenko Milošević

Nepras skribi pri Ivana Brlić Mažuranić, ke ŝi estis interesege persono ne nur enlande sed mondvasse. Ŝi finis privatajn lernejojn kaj parolis la germanan, francan, rusan, anglan kaj italan lingvojn. Ŝi estis la fidela akompanantino de sia edzo ekde la plej junaj jaroj, ĉar ŝi edziniĝis 18-jara, ŝi patrinigis kvinfoje, politike aktive laboris kun sia edzo kontraŭ la reĝimo de Khuen-Hedervary kaj skribis belegajn fabelojn, rakontojn, poemojn kaj romanojn. Oni nesufiĉe ofte mencias skribante pri ŝia stranga kaj tragike finiĝinta vivo, ke ŝi ricevis pro sia patriotisma laboro la oran medalon de la episkopo Josip Juraj Strossmayer, kiu estis la mecenato kaj fondinto de la Akademio pri scienco kaj artoj.

La verkistino Ivana Brlić Mažuranić devenas el la fama kroata familio Mažuranić, nome, ŝia avo estis banuso Ivan Mažuranić, nomita "banuso popolano", kiu kompletigis la mankantajn partojn de la fama verko "Osman" de Ivan Gundulić, kaj verkis tre faman eposon "La morto de Smail-ago Cengić". Ŝia patro Vladimir Mažuranić, filo de Ivan Mažuranić, komencis aperigadi ĝuste en la jaro 1908, kiam aperis la organizita movado por Esperanto en Kroatio, la plej faman verkon de la kroata historio "Kontribuoj por kroata jura - historia vortaro". La familio Mažuranić estas juvelo sur la kroata kutura, politika kaj verkista krono. Menciendas, ke la familia nomo estis por la unua fojo menciita en la 15-a jarcento, kaj la vera genealogio de ŝia familio datas ekde la mezo de la 17-a jarcento. Multaj inter ŝiaj familianoj, anatuloj kaj posteuloj, estis tre famaj, ekz. ŝia avino Aleksandra kiu estis fratino de la kroata verkisto Dimitrije Demetar, membro de la Iliria movado.

Ivana naskiĝis la 18-an de aprilo 1874 en Ogulin (regiono de Gorski Kotar) kaj ŝia familio sekvontjare translokiĝis al Karlovac kaj pli poste al Zagrebo. Tamen, en sia autobiografio ŝi skribis, ke post la dua alveno al la naskiĝurbo Ogulin ŝi sentis la grandan impreson de la neĉiutaga ĉirkaŭaĵo, strangaj formoj de la monto Klek

kaj la romantikeco de la rivero Dobra. Tio rezultis per verkado de la unuan poemo "Zvijezde moje domovine" (=Steloj de mia hejmlando). Post la edziniĝo al advokato kaj politikisto Vatroslav Brlić, ŝi translokiĝis el Zagrebo al Brod na Savi (nuntempe Slavonski Brod) kie ŝi vivis plejparton de sia vivo en rondo de la multmembra familio da siaj gefiloj. Ŝi okupiĝis pri eduka, literatura laboro kaj estis engaĝita ankaŭ en la politika laboro.

La unua libro "Valjani i nevaljani" (=Bonuloj kaj malbonuloj) eldonita en la jaro 1902 kaj pli poste eldonitaj libroj kaj la poemaro "Slike" (=Bildoj) ne vekis atenton de literaturkritikistoj. Dank' al la junaĝa amikeco kun la najbaro Antun Gustav Matoš, post la apero de la libro "Cudnovate zgrade šegrta Hlapića" (=Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić) oni malkovris ŝian verkistan talenton. La plenan verkistan sukceson ŝi spertis post la apero de "Priĉe iz davnine" (=Rakontoj el pratempo), aparte kiam la libro estis kompletigita per ilustraĵoj de Vladimir Kirin, en la jaro 1926. En la libro "Rakontoj el pratempo" ŝi kombinis la kroatan kaj la slavan mitologiojn kun hiperbolaj fantastaj riĉesprimaj konversacioj. Estas interese kiel la verkistino aplikis la rolon kaj fantazion pri la rokomo Klek por skribi la rakonton "La arbaro de Stribor". La unuan instigon ŝi trovis en la letero al ŝia filo Ivan: "Kaj tiam iun tagon en nia granda kameno eksplodis pro la fajro la pina lignoŝtipo, kaj la fajreroj kiel svarmo da steletoj alflugis al mi. Tuj al mi venis la ideo pri "domaĉi" (=hejmuloj).

La verkistino aŭtoris ankoraŭ kelkajn librojn, ĉefe rakontojn kaj poemojn por junularo: "Srce od licitara" (=Mielkuka koro) kaj "Basne i bajke" (=Fabeloj kaj fabeloj). La lasta ŝia libro estis la nefinita aventura-historia romano "Jaša Dalmatin - potkralj Gudžerata" (=Jaša Dalmatiano - vicreĝo de Gudjarato) kiu baziĝas sur la esploroj de ŝia patro pri la vicreĝo de la hindia provinco inter la 15-a kaj 16-a jarcento. Ŝiaj interesoj estis



tre vastaj. Ivana Brlić Mažuranić prelegis, verkis eseojn kaj artikolojn por diversaj revuoj kaj gazetoj.

Ŝi estis la unua virino membro de la Akademio pri scienco kaj arto en Zagrebo kaj kiel verkistino, du-foje ŝi estis proponita por la literatura Nobel-premio. Ŝiajn verkojn oni tradukadis al la plej gravaj mondaj lingvoj, inkluzive al Esperanto, per kiu kiel ponto-lingvo ŝiaj rakontoj estis donacitaj al vasta juna legantaro de la mondo. Ŝia majstroverko "Priĉe iz davnine" estis Esperantlingve dufoje tradukitaj sub la titoloj "Rakontoj elantikvaj" (laŭ Z.Seleš), kaj "Rakontoj el (fora) pratempo" (laŭ retejo de KEL). Parto de la fabelaro "Arbaro de Stribor", aperis en la revuo "Koko", numero 2/1989 tradukita de Z. Seleš. Inter multaj ŝiaj verkoj por ni esperantistoj verŝajne la plej grava estas "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić", kiun tradukis Maja Tišljak kaj eldonis Kroata Esperanto-Ligo en 1998. La ĉarma verko pri la malgranda kaj brava metilernanto Hlapić, el la kroata per Esperanto kiel lingvo-ponto, estis tradukita al aliaj lingvoj, ekz. al la persa (2005), japana (2005), vjetnama (2006) kaj bengala (2008).

Okaze de la sepdekjara datreveno de la aŭtorina morto (la 29-an de septembro 1938 en Zagrebo), ni demandu nin: ĉu la verkistino meritas ke oni nomu ŝin kroata Andersen aŭ Tolkien? Ŝi virtuoze verkis por infanoj kaj ŝi miksis la fantazian mondon de mitologio, sed plej taŭgas akcenti, ke Ivana Brlić Mažuranić estis verkistino kiu pro sia originaleco kaj imagbeleco povas stari ĉesultre kun la plej grandaj porinfanaj verkistoj de la mondo.



ANNEKE BUYS - MULTFLANKA ARTISTINO



Anneke Buys naskiĝis en Leiden (Nederlando) en 1945. Ŝi laboris kiel helpistino de gemaljunulo kaj nun estas emeritulino. En 1983, post dudekjara silento, ŝi ekverkis poemojn en la nederlanda kaj la angla. Post kiam ŝi lernis Esperanton en 1986, ŝi ekverkis kaj tradukis ankaŭ en tiu lingvo. Anneke Buys gajnis kelkajn premiojn en nederlandaj poeziaj konkursoj kaj estas unu el la fondintoj de BAFA, la anglalingva Bahaa Asocio por la Artoj. En 1988 kaj 2005 ŝi partoprenis en poeziaj festivaloj en Tajvano. Ŝi mem aperigis tri poemarojn en la

nederlanda: *Groei in millimeters* (kreskado en milimetroj), *Breuklijnen* (Romplinioj) kaj *Droomwerelden* (Songmondoj). En 2006 la eldonejo Impeto eldonis ŝian Esperantan poemaron *Reve kaj reale*. Anneke Buys pentras abstraktajn akvarelojn kaj skulptas malgrandajn – ĉefe abstraktajn – figurojn el steatito ("sapŝtono"). Ŝi edziniĝis al Klaas Schouten en 1965, sed verkas sub la fraŭlina nomo.

SORĈVORTOJ

Faru tri amuzaĵojn
plenumu du promesojn
al vi mem
faru kvar novajn
forjetu trivitan palton
stiku vian plej belan planton
kaj fordonu ĝin.

Promenu horon en la vento
ame varmigu la sunon
trou en neĝo sonoriletojn.

Metu ĉion en la koron
de via memoro. Tiel
vi faras tre belan
maljunaĝon.



PUPOJ DAŬRE VIVAS

La ĉi-jara, 41-a Pupteatra Internacia Festivalo, okazis en Zagrebo inter la 29-a de aŭgusto kaj 5-a de septembro. Unu el la prizorgantoj de PIF dum multaj jaroj, Ivan Špoljarec (Stef), preparis kaj la festivalo eldonis la 238-paĝan, riĉe ilustritan monografion pri tiu escepta pupteatra festivalo.

La monografio "**Lutke uživo / Puppets live / Pupoj vive**" estas trilingva (kroata-angla-Esperanta). Formato: 22,5 x 30,5 cm. ISBN 978-953-6697-22-9. Prezo: 200,00 kunaoj. Mendebla ĉe: pif@mcuk.hr



Konsilo de rabeno

Geedzoj venas al la rabeno:
"Nia geedza vivo malsukcesis kaj ni ambaŭ deziras ekسدziĝi. Sed ekzistas problemo: ni havas nur unu infanon - filon - kaj ni ne sukcesas decidi kiu el ni eduku lin."
Respondis la rabeno: "Iru hejmen kaj revenu post unu jaro. Tiam vi havos plian infanon kaj vi dividos la du infanojn inter vi."
La paro obeis kaj hejmeniris. Post unu jaro ili revenis al la rabeno, tute malĝojaj: "Rabeno, naskiĝis al ni ĝemeloj..."

venu al la 42-a konferenco de ILEI

✍ *Małgorzata J. Komarnicka*

Venu konferenci en la plej fama pola urbo, Eŭropa Kultururbo, Krakovo!
En Krakovo inter la 17-a kaj 25-a de julio 2009 okazos la 42-a konferenco de ILEI, kun la temo:

La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado

Krakovo mem estas luksa! Ĉiuj tuj rimarkas, ke la urbo havas ĉarmon kaj propran etoson, kaj ke necesas pli da tempo por viziti ĝin ... do ili revenas... Ankaŭ ege allogas la minejo en Wieliczka - mondunika, kun artaĵoj skulptitaj en salo-ŝtonegoj! Pri tio, ke Krakovo havas buntan, firman kaj diversaspektan E-agadon, ne necesas konvinki iun ajn! Nek pri tio, ke ĝi estas sidejo de la pola sekcio de ILEI.

POR LA PROGRAMO NI ANTAŬVIDAS:

- Interkonan manĝvesperon
- Solenan Inaŭguron
- Simpozion laŭ konferenca temo
- Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj
- Seminarion de E@I
- Seminarion de lernu!
- Seminarion de InterKulturo
- Apartan programon por universitataj instruistoj
- Kunlaborsesiojn kun AIS kaj ISAE
- Laborgrupojn laŭ diversaj temoj
- Kelknivelajn lingvajn kursojn
- Programerojn por instruemuloj
- Studrondon pri E-literaturo
- Prelegojn de partoprenantoj
- Riĉan ekskursan programon
- Buntan kaj varian kulturalan programon
- Distran programon ĉiuvespere

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, la urbo kaj la partoprenkondiĉoj aperos en *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) kaj en la retpaĝo de ILEI www.ilei.info

Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn, vi ĉiam estas bonvena skribi al:

Aida Ĉizikaite (ILEI-estrarano pri konferencoj):
aidute@mail.lt kaj
Małgorzata Komarnicka (ĉefa loka organizanto)
margareta.ilei.pollando@gmail.com

PUBLIKE PRI ESPERANTO

La 2-an de junio Radio Zlatar (www.radio-zlatar.hr) publikigis la tekston "Obilježena obljetnica pada Hraščanskog meteorita".

La 12-an de junio la zagreba tagĵurnalo "Vjesnik" publikigis la tekston de Sandra Viktorija Antić titolitan "Na esperantu 'pisao' i Držić". La artikolo taksas kulturajn atingoj de Esperanto en Kroatio en la pasintaj cent jaroj.

La 20-an de julio la retpaĝo de kroata Ministerio pri eksteraj aferoj (www.mvpei.hr) publikigis artikolon pri la 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Roterdamo.

La 5-an de septembro "Glas Slavonije" publikigis la tekston de Snježana Fridl pri Mavro Spicer, kiu komplete baziĝas sur la teksto de Velimir Piškorec publikigita en "Našički zbornik", kiu elstarigas la multflankecon de Spicer kaj lian ŝlosilan rolon en Esperanto.

La 8-an de septembro la tria programo de *Kroata radio* elsendis 30-minutan intervjuon de sia ĵurnalistino Lidija Lacko-Vidulić kun d-ro Velimir Piškorec en la elsendo "Razgovor s povodom" (Kaŭzita interparolo). Temas pri escepte trafa reklamo de Esperanto farita de profesia lingvisto, kiu argumentas kun la celo forigi antaŭjuĝojn de ĝenerala publiko pri la Internacia Lingvo Esperanto.

La 1-an de oktobro, "Slobodna Dalmacija" en Split publikigis la artikolon "Esperanto za heroja Vranica", aŭtoritan de D.G. (=Davor Grgat), en kiu oni rememoras pri la unua esperantisto pereinta en la Patrolanda milito, membro de Esperanto-societo en Split.

RICEVITAJ GAZETOJ

LA PACIFIKA KURIERO n-ro 1(23), aŭgusto 2008. Sendita de Esperanto-klubo "Pacifiko" el Vladivostoko (Rusio).

ESPERANTO n-roj 7(31) kaj 8(32). Monata, parte dulingva Bulteno de Esperanto-Societo "Split". La ricevitaj numeroj represas plurajn tekstojn el "Zagreba Esperantisto". Dankon!

INFORMA BULTENO de Bolonja Esperanto-Grup "Achille Tellini 1912" (Bolonjo, Italio), n-ro 3/2008.





**BONA INTENCO KUN
MAGRA REZULTO ("Zagreba
Esperantisto" 4/2008)**

Estimataj,

Dankon pro viaj komentoj rilate nian vortaron. Kelkfraze ni provu klarigi la aferon. La laboron pri ĉi tiu vortaro ni komencis kun la ideo fari ion utilan por Esperanto-komunumo en Kroatio, ĉar el diversaj fontoj ni ricevis certajn kvantojn da kompostajoj, kredante samkiel ĉiam, ke ili estis liveritaj al ni bonintente. Bedaŭrinde, la projekto de la Esperanto-vortaro ne montriĝis sukcesa, ĉar la intereso pri ĝi ne nur estis malgranda, sed ĝi preskaŭ ne ekzistis. Tial ni decidis ne daŭrigi evolui ĉi tiun projekton. Ĝian uzadon ni proklamis senpaga laŭ principo "as it is" uzante ĝin por senpaga demonstrado de la sistemoj por aliaj lingvo-paroj. LA instrukcioj kiel senpage uzi la vortaron troviĝas jam longan tempon ĉe: http://taktikanova.eu/index.php?option=com_content&task=view&id=285&Itemid=53.

Nia lasta decido estis, ke

la vortaro estu senpaga ĝis la fino de la kuranta jaro. Mi kontrolis kio okazis kun via pago. Per nia eraro ni ne forigis la aŭtomate generitajn paginformojn por ĉi tiu vortaro (en la reta vendejo ĝi ne troviĝas kiel vi rimarkas), kaj evidente via oferto kaj pago estis generita tiamaniere, kaj la kolegoj fiksis finon de via licenco je 31-a de decembro 2009, kio signifas: senpage ĝis la fino de ĉi tiu jaro kaj unu jaron da pagita licenco. Bedaŭrinde, vi estis la sola persono kiu pagis ĉi tiun produkton.

La sola afero farebla en ĉi tiu kazo estas pardonpeti pro nia eraro kaj repagi al vi la pagitan sumon al konto de vi sciigota, ĉar ni decidis pro manko de kvalitaj vortaraj kompostajoj ne komerciigi la produkton eĉ post la fino de ĉi tiu jaro.

Depende de la evoluo de eventoj surkampe de Esperanto, ni decidis pri la daŭrigo de la projekto aŭ pri ĝia definitiva fino. Ĝis tiam, samkiel ĝis nun, ni faros korektojn pri kiuj oni atentigs nin.

Koran saluton,
Damir Pleško, Taktika Nova

Salutante vin de la bordo de Pacifiko, mi kore dankas vin pro la antaŭe senditaj numeroj de "Zagreba Esperantisto" kaj ĝojas kunlabori kun vi, precipe en la sfero de organizo kaj funkciado de studenta Esperanto-klubo.

Sincere, via
Aleksandr Titajev
(reprezentanto de Rusia Esperantista Unio en Fora oriento de Rusio kaj prezidanto de E-klubo "Pacifiko")



Sur la foto: Nia leganto Smail Grbo el Sarajevo (Bosnio kaaj Hercegovino) kun familianoj

**REAGJOJ PRI NIA
PORTALO**

Mi volas gratuli al la administrantoj de tiu portalo, kiu estas kaj estos unu el la gravaj interligiloj en nia Movado. Saluton de
Elma do Nascimento

Ankaŭ mi aliĝas al la gratuloj de aliaj pro la beleco kaj kvalito de la paĝoj. Nur daŭrigu tiel. Amike al ĉiuj.
Krešimir Barković (Parizo, Francio)

Multajn gratulojn pro la bela kaj varia informejo.
Baldur Ragnarsson (Islando)

Tre belaj paĝoj!
Renato Corsetti (Italio)

Gratulon, via retejo estas tre bela. Mi provos el ĝi lerni prilaboron de retejoj.
Miroslav Malovec (Ĉeĥio)

Estimata redaktoro, estu bonvola akcepti miajn tre korajn salutojn el Silezio en Pollando por Vi kaj por ĉiuj viaj gekolegoj en la medio de Zagreba Esperantisto! Ĉion bonan kaj bonfarton!
Stanisław Śmigielski (Pollando)

Mi vizitis la paĝaron, legis la artikolojn kaj trarigardis ĉiujn fotojn. Tre bona kaj interesa paĝaro.
Elena Ŝaravina (Krasnojarsko, Rusio)

Ho amikoj! Saluton el Usono!!! Mi estas feliĉa esti ano ĉi tie! Mi gratulas ĉiujn.
Barry Friedman (Usono)

Mi ĝojas, ke ankaŭ en Kroatio Esperanto estas ligita kun ekologio. Dankon al Zlata Nanić por tiu laboro. Eble vi interesiĝas kunlabori kun AVE (Verduloj Esperantistaj). Samideane,
Manfred Westermayer



La siberia rivero Jenisejo en sia fluejo

Silente fluas Jenisejo

 *Elena Ŝaravina*



La urbo Krasnojarsko el Bobrovj log